

# esperanto



MAJO 1992 • 85-A JARO • N-RO 1037 (5)

ISSN 0014-0935



Fortikaĵoj konkerotaj  
La jarraporto de UEA

## Estrara raporto: Universala Esperanto-Asocio en 1991

- 81 Enkonduko: Progreso signifas kaj ĝojojn kaj zorgojn
  - 82 Ĝeneralaj: Prepariĝas prudentaj ŝanĝoj
  - 83 Administrado: Nove-malnova CO-direktoro
  - 84 Financo: Daŭra plifortiĝo, eksplodo de fondaĵoj  
Instituto Hodler: Pli da subvencioj
  - 85 Periodaĵoj kaj serioj: La redaktoraĵoj kaj kraĵoj en novaj manoj
  - 86 Kongresoj kaj turismo: Pli liberaj sed ne pli riĉaj orient-eŭropanoj
  - 87 Informado: Modernigo, konkretigo, aktualigo
  - 88 Eksteraj rilatoj: Prete al gravaj debatoj  
Landa kaj regiona agado: Perdo de pionira rolo en Eŭropo
  - 90 Junulara sekcio: Nova estraro ne bambas sed planas
  - 92 Kulturo: Mecenatoj subtenas persistantojn
  - 93 Instruado: Ĉu nova ILEI-teamo dudek-obligos  
la komencantaron?
  - 94 Faka agado kaj scienca aplikado: Malprofesieco bremsas  
komercan agemon  
Esploro kaj dokumentado: Prestiĝaj eldonaĵoj kaj konferenco
  - 95 Fondumo Zamenhof: Post senmoveco, nova instigo  
Finaj vortoj: Recenzu nian filmon
  - 96 Financaj aldonaĵoj: Spezokonto, Bilanco, Fondaĵoj, Rezervoj,  
Buĝeto 1993  
*Fino de la Estrara Raporto 1991*
- 100 Esperanto en radio

## Vi trovos

panoramon de la pasintjara agado sur la sekvaj paĝoj: koncizan raporton tajlitan laŭ la rigora ĉapitro-skemo de movadaj agad-terenoj, iom sekan kaj foje eĉ lingve ŝablona: se mankas spaco por la detaloj, ĉu eblas ĉiam eviti esprimojn kiel "tre pozitivaj evoluoj", "kontingenta gvidantaro" aŭ "unu el la plej ...aj ...oj"? Tamen, ĉi tiu bilanco pri la pasinta jaro estas faktoro unika, ĉiam rekonsultebla valora dokumento – kaj multe pli, ĉar inter la faktoj Vi kaptos ankaŭ ideojn, konkludojn kaj proponojn por ĉies konsidero. *Kio estas farinda?* Por respondi al la demando, necesas unue scii *kio estas farita*. Kiel futbal-trejnisto kun siaj ludantoj vidbende re-spektas luditan matĉon por pli bone sukcesi en la sekva, tiel same povas ĉi tie revidi la movadajn rezultojn ĉiu el nia tutmonda teamo: arieruloj, halfoj, avanuloj – kaj eĉ simplaj spektantoj.

*La kovrilo:* Geoffrey Greatrex, prezidanto de Esperanto-Asocio de Britio (dua antaŭe) estas gvidonta kastelviziton en Esperanto. La fortikaĵoj de Skipton Esperanto do sukcese sieĝis. Sed atendas nin pli grandaj defioj: fortresoj konkerotaj de la Internacia Lingva Ordo. (Fotis David Hyde)

## esperanto

Oficiala organo de  
Universala Esperanto-Asocio  
(en konsultaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

**Aperas** monate (escepte de aŭgusto).  
**Fondita** en 1905 de M. P. Berthelot (1882-1910); **establiĝita** kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920). **Legata** en 115 landoj. **Voclegata** por blinduloj.  
**Redaktoro:** István Ertl.

**Abonprezo:** varias laŭlande (gld. 55,12; US\$ 27; GM 48; enoj 3960; ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-suba adreso. Unuopa ekzemplero kostas 5,00 guldenojn.  
**anonzarifto** (gld.): 1 p. 1760, 1/2 p. 970, 1/4 p. 540, 1/8 p. 300, 1/16 p. 170. Movada rabato 50%. Eksterkovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

**Adreso de la Centra Oficejo de UEA:** Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.  
**Telefona:** +3110 436 10 44 kaj 436 15 39.  
**Telefaks:** +3110 436 17 51.  
**Teleks:** 23721 uea nl.

**Telegramoj:** ESPERANTO ROTTERDAM.  
**Banko:** Bank Mees & Hope, Postbus 749, NL-3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (ĝiroficejo Den Haag).

**Ĝenerala Direktoro:** Simo Milojević.  
**Direktoro de la CO:** Osmo Buller.

## Estraro de UEA

**Prezidanto** (kunordigado, planado): prof. d-ro John C. Wells, 5 Poplar Road, London, Britio SW19 3JR; tel. (081) 542 0302; telefaks (071) 383 4108.

**Vicprezidanto** (regiona agado, turismo, Fondumo Zamenhof): s-ro Roman Dobrzyński, u. Majdańska 13 m 91, PL-04-088 Warszawa, Pollando; tel. (22) 10 35 05.

**Vicprezidanto** (eksteraj rilatoj, esperantologio): d-ro Ulrich Lins, Gemarckenstr. 150, D-W-5000 Köln 80, FR Germanio; tel. (0221) 680 32 50.

**Ĝenerala Sekretario:** s-ro Ian Jackson, 29 Graham Road, London W4 5DR, Britio; tel. (081) 995 6244; teleks 8959991 cowaard g; telefaks (071) 726 8561.

**Estrano** (informado): s-ro Ivo Durvael, Paul Gilsonlaan 5, B-2650 Edegem, Belgio; tel. (03) 440 30 92.

**Estrano** (financo, junularo): s-ro Grégoire Maertens, Pr. Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; tel. (050) 35 49 35.

**Estrano** (landaj kaj fakaj asocioj): s-ro Oszkár Princz, Sallai u. 4. II.3, H-1136 Budapest, Hungario; tel. (HEA) (1) 15 60 244.

**Estrano** (azia agado, aplikado en scienco): prof. d-ro So Gilsu, Yangcheon PO Kesto 11, Seoul - 158-600, Korea Respubliko; tel. kaj telefaks (02) 646 5413.

**Estrano** (kulturo): s-ino Spomenka Štimec, Nova Ves 87, CRO-41000 Zagreb, Kroatio; tel. (041) 42 92 51; telefaks (041) 42 12 94.

**Observanto** (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj [ILEI]): s-ro Stefan MacGill, Eső u. 7 III, H-1034 Budapest, Hungario; telefon-mesaĝoj kaj telefaks g-er HEA, (1) 15 60 244.

**Observanto** (Iutmonda Esperantista Junulara Organizo [TEJO]): f-ino Saskia Idzerda, Bruchwiesenanlage 4, Z. 801.4, D-W-6602 Dudweiler, Germanio; tel. (06897) 765402.

# Estrara raporto: Universala Esperanto-Asocio en 1991

Enkonduko:

## Progreso signifas kaj ĝojojn kaj zorgojn

"Inter la fortoj de la Esperanto-movado (...) estas la granda lojaleco de nia membraro. Tio montriĝis ankaŭ en 1991. La unuan fojon en sesdek jaroj, la nombro de individuaj membroj de UEA superis ok mil. Gratulon! Alia forto estas la tradicio de Universalaj Kongresoj; tiu de Bergeno kombinis neatendite grandan nombron de partoprenantoj kun bona sukceso ĉe la enlanda gazetaro kaj televido." Tiel elstarigis la plej pozitivajn erojn en la pasintjara vivo de UEA prezidanto John Wells en sia novjara mesaĝo por 1992.

La rekorda membronombro kaj la UK de Bergeno kaŝas en si komplekson de evoluoj, kaj ĝojigaj kaj zorgovekaj. La kresko de la forto de UEA ĝojigas, ĉar ĝi fakte atestas pri progreso de la Asocio ĝenerale, kiu kreskigas fidon kaj altiras aliĝojn. Ĝojigas la rajto de orient-eŭropanoj libere partopreni internaciajn aran-

ĝojn, sed tion kontraŭpezas en ilia mondoparto perdo de pozicioj de Esperanto, pri kiuj ni ĉiuj iam fieris. Tiun komplekson de atingoj kaj perdoj la Estraro klopodas malvolvi sur la sekvaj paĝoj, por informi pri faktaj kaj por doni impulsojn al pripensoj kaj agado.

La celo de tiu ĉi dokumento estas raporti ne nur, kvankam ja ĉefe, pri la agado kadre de UEA sed ankaŭ ekster ĝi. Tian pli ĝeneralan skizon oni povas atendi de UEA; por la ekstera mondo ĝi ja reprezentas la tutan movadon, eĉ se ĝi mem ne pretendas tion. Tiun ĉi raporton ricevas ĉiuj individuaj membro de UEA. Tiuj kies membroco inkluzivas ricevon nur de tiu ĉi numero, espeble ekstantas la bezonon estonte aliĝi kiel Membro-Abonanto por ricevi la plej plenan kronikon pri nia movado, la jarkolekton de *Esperanto*.

En 1991 la individua membraro plinombriĝis de Brazilo ĝis Tajvano, de Varsovio ĝis Jhelum (Pakistano, malsupre).



## Prepariĝas prudentaj ŝanĝoj

### STRUKTURO KAJ KONSISTO

Post longa preparado la Komitato akceptis en la 76-a UK en Bergeno novan Ĝeneralan Regularon, multe pli kompletan kaj precizan ol tiu de la jaro 1982. Ĝi pli kongruas kun la efektiva agado de UEA, dum en la Statuto – kies revizio nun diskutigas – ĉiam pli sentebblas kelkaj mankoj. Projekto de nova Komitata Regularo estis prove aplikata dum la sesioj en Bergeno, cele al akcepto en Vieno. Post kvinjara provperiodo la Komitato konstantigis la malmultekostan kategorion de individua membreco, *Membro kun Gvidlibro*.

Neniu landa asocio petis aliĝon en Bergeno, sed la nombro de kunlaborantaj fakaj asocioj kreskis al 34 pro kontrakto kun Asocio de Studado Internacia pri Spiritaj kaj Teologiaj Instruoj. UEA nun havas 50 aliĝintajn landajn asociojn kaj ses aliĝintajn fakajn asociojn.

En 1991 daŭris la membrovarba kampanjo, kiun la Centra Oficejo iniciatis en 1989. Jam la duan fojon la CO proponis al Esperanto-gazetoj sukcesan varbreklamon. Revarda letero sendiĝis al la nekotizintoj en junio. La nombro de individuaj membroj denove fariĝis rekorda: 8071 membroj en 114 landoj, diference de 7645 en 97 landoj en 1990. La individua membraro do kreskis per 426.

Ĝi dividiĝis jene: Membro-Gvidlibro 592 (en 1990: 658), Membro-Jarlibro 1675 (1350), Membro-Abonanto 3954 (3919), Juna Membro-Jarlibro 426 (342), Juna Membro-Abonanto 421 (377), Dumviva Membro 961 (961), Honora Membro 42 (38). Plej elstaris la kresko en Pollando, Finnlando, Ĉinio, Tajvano, Koreio, Brazilo kaj la tiama Sovetunio.

La financaj sekvoj tamen ne samgrade altis. Ĉar la kresko okazis ĉefe en malpli riĉaj landoj, la kotizoj estis nur 2,7% pli ol en 1990, dum la membraro kaj la servoj plenumendaj por ĝi kreskis per 5,6%. Tio trudiĝis la decidon ne plu akcepti rublojn el la ekssovetiaj landoj, kio mal-

multigos individuajn membriĝojn tie por 1992.

Same pro la organiza kaj financa krizo de la movado en Orienta Eŭropo, la nombro de aligitaj membroj plu falis pasintjare: de 25 224 en 1990 al 19 146 en 1991. Ĉi-foje Bulgario (1250 anstataŭ 5057 en la antaŭa jaro) kaj Hungario (1964 anstataŭ 3295) ŝrumpis. Al la malkresko kontribuis la malfondo de la asocio en la iama GDR. Aliflanke Ĉeĥio povis pagi en 1991 por 1074 membroj anstataŭ nur por 210 en 1990.

La Honora Patrona Komitato de UEA arigis jarfine 10 eminentulojn. En Bergeno la Komitato distingis sep elstarulojn per honora membreco: Károly Fajsz (Hungario), Kurisu Kei (Japanio), Jaan Ojalo (Estonio), Johan Hammond Rosbach (Norvegio), Shin Pongcho (Koreio), Karl Söderberg kaj Jan Strönné (Svedio). Forpasis tri Honoraj Membroj: Alec Venture, E. J. Woessink kaj G. Waringhien. Mortis ankaŭ Marianne H. Vermaas, longtempa direktorino (1955-1968) de la Centra Oficejo.

La subtena Societo Zamenhof havis 145 membrojn, t.e. 15 malpli ol en 1990. Ili ricevis dum la jaro du cirkulerojn de la prezidanto, specialan oferton de la ĵus aperinta *Nova Esperanta krestomatia*, kaj inviton al la tradicia akcepto en la UK.


La Delegita Reto iom plivastiĝis: 2302 en 72 landoj kompare kun 2278 en 71 landoj en 1990. Komenĉiĝis ellaboro de nova Regularo pri Delegitaco (v. artikolon en la venonta numero de *Esperanto*).

### GVIDORGANOJ

Membrolisto de la Komitato aperis en la Jarlibro 1991 (p.15-19). Poste tamen la nombro de komitatanoj A falis per 11 (5: Pollando, 4: Bulgario, 2: Hungario) pro malkresko de aligitaj membroj. Aldoniĝis unu plia komitatano C, tiel ke la Komitato konsistis el 82 membroj (55 A, 8 B kaj 19 C) kaj 9 observantoj.

La Estraro – ĉiuj naŭ membroj – kunsidis dufoje: fine de marto en Roterdamo kaj dum la UK en Bergeno. Post la oficiŝtigo de O. Buller, Ian Jackson iĝis ĝenerala sekretario ekde la 1-a de januaro.

La Estraro starigis trimembran komisionon (I. Jackson, U. Lins, B. Moon) por ekzameni petojn de fakaj asocioj pri kunlabora kontrakto kaj aliĝpetojn de landaj kaj fakaj asocioj, kaj por prepari la traktadon de tiuj petoj ĉe la Komitato. En 1991 entute funkciis 23 komisionoj kaj komisiitoj.



*La multflanka Rüdiger Eichholz deĵoris 34 jarojn estre de la Magnetofona Servo.*

Demisiis Rüdiger Eichholz kiel komisiito por la Magnetofona Servo de UEA, kiun li prizorgis ekde ĝia starigo en 1958. Tra la jaroj Eichholz amasigis riĉan kolekton de valoraj registraĵoj. Nova komisiito ankoraŭ ne povis esti nomumita, pro kio la Servo bedaŭrinde devis provizore ĉesi.

### STRATEGIA PLANO

La Komitato faris kelkajn modifojn kaj aldonojn al la Strategia Plano kaj atentigis pri la bezono pli klare priskribi en ĝi la praktikan aplikadon de Esperanto. La Estraro ekdiskutis pri projekto de Laborplano 1993-1996. Ankaŭ en la bergena Unua Ĝenerala Kunsido okazis tiutempa longa diskuto. Definitivigo de la Laborplano restos tasko por la nova Estraro.

## Nove-malnova CO-direktoro

### PERSONARO


La Centra Oficejo spertis kelkajn ŝanĝojn en 1991. La direktoran postenojn de la CO, kiu vakis dum unu jaro, meze de februaro reprenis la iama direktoro Osmo Buller. Atie van Zeist dungigis en majo kiel sekretario. Post pli ol kvin jaroj foriris en septembro, pro studado, Francisco Javier Moleón, redaktoro de la Jarlibro. Sekve John Rapley laboris plentempe anstataŭe duontempe por redakti la Jarlibron 1992.

Tra la tuta jaro laboris Mark Fettes (*Esperanto*, informado), Ina v.d. Krans (membraro, librotenado), Roy McCoy (kompostado), Ina Mercej (purigado), Simo Milojević (ĝenerala direktoro), Rob Moerbeek (ekspedo, provelgado), Nikola Rašić (kongresoj), Marvin Stanley (financo), kaj Pasquale Zapelli (libroservo).

Ĉar kelkaj deĵoris ne tutjare aŭ ne plentempe, la meza nombro de ofiĉistoj egalas al 10,2 plentempaj dungoj (9,6 en 1990 kaj 10,3 en 1989).

Dum la tuta 1991 plulaboris civilservanto Rob Keetlaer, ĉefe en la Biblioteko Hodler. Multaj ĝejunuloj povis labori, dank' al donacoj al la Volontula Fondaĵo, kadre de la Volontula Servo. En januaro finis kelkmonatan deĵoron Chris Gledhill (Britio). Plej longe, ses monatojn ekde julio, volontulis Tom Geller (Usono), en la grafika fakoj. Po unu-dum semajnojn kontribuis Arvydas Kazlauskas (Litovio) en januaro kaj Sean Osborne (Nederlando) en junio. Por la revuo *Esperanto* István Ertl (Hungario) kaj Miroslav Malovec (Ĉeĥoslovakio) laboris po unu semajnon en septembro kaj Francisco Veuthey (Argentino) kvin semajnojn en septembro-oktobro. Du aziaj aktivuloj venis kun subvencio por plisparto en iu movada centro. Chan Sook Wai (Malajzio) deĵoris de aŭgusto ĝis decembro, kaj Gu Jian-hua (Ĉinio) de semajnojn en novembro-decembro.

Pluraj lokaj esperantistoj helpis al la oficejo. N. Moerbeek, H. Rapley kaj J. Klok kunekspedis la revuon kaj la Jarlibron. J. Calado valore



*El naŭ volontuloj en 1991, Tom Geller plej longe fidelis al la CO de UEA.*

kontribuis al la prizorgado de la domo. Fred de Geus plus konsiladis pri la komputilaro, asistate de H. Bourguignon kaj M. Libourel. Ekde novembro Bart Ruigrok helpas du tagojn semajne en la arkivo kaj biblioteko.

Post 50 jaroj unuafoje nomumigis ĉefdelegitoj por Estonio kaj Latvio, resp. Johannes Palu kaj Maris Jakobsens. En Aŭstrio Leopold Patek sekvis post Ernst Majtanić, kiu plenumis la taskon de ĉefdelegito dum 13 jaroj.

### INSTALAJŬOJ

Dum la jaro signifaj aĉetoj estis nur detri komputilaj terminaloj, anstataŭontaj pli ol 10-jarajn kadukajn aparatojn, kaj de du elektronikaj pesiloj por la ekspedejo. Oni tamen eksondis pri la aĉeto de nova komputila sistemo, kiu anstataŭu la nunan, jam tro malrapidan kaj neefikan sistemon. En la bergena UK Oomoto donacis 10 000 dolarojn, kiuj financos gravan parton de tiu aĉeto.

### SERVOJ

La Jarlibro ekspedigis al la membroj jam meze de marto, tri monatojn pli frue ol en 1990. La enhava strukturo kaj la amplekso (c. 400 paĝoj) ne ŝanĝigis. La unuaj 128 paĝoj aperis kiel depresajo titolita *Gvidlibro tra la Esperanto-movado*, por la membroj "kun gvidlibro". Pro neantaŭvidite granda kresko de la individua membraro, la eldonkvanto de la Jarlibro ne sufiĉis. Tial al kvarcento da malfruaj kotizintoj sendigis anstataŭe malnova Jarlibro aŭ la verko *Fenomeno Esperanto* de W. Auld aŭ *Esperanto: lingvo-literaturo-movado* de P. Janton. Cetera la tre frua apero de la Jarlibro kaŭzis ke nekutime multaj ricevis ĝin aparte, post la amasa dissendo – do pli koste. Pro tiuj spertoj rekomendindas reveni al la aprila-maja aperigo de la Jarlibro.

En junio aperis *Nova Esperanta krestomatio*, la kvina ero de la Jubilea Kolekto "Jarcento de Esperanto". La represo de *Winnie-La-Pu*, anoncita por 1992, povis surmerkatigi jam en decembro. Pliaj libroj pretigis, tiel ke la jaro 1992 alportos pli da novaj UEA-eldonaĵoj.

La Libroservo eksperimentis rektan reklamadon al selektitaj celgrupoj kaj regulajn ofertojn de rabatitaj varoj. La spertoj kuraĝigas. Tamen, la totalo de malnetaj vendoj malkreskis: 270 500 gld. anstataŭ 290 000 gld. La neta rezulto de la Libroservo tamen estis iom pli alta: 71 000 gld. anstataŭ 69 000 gld. Abon-perado de gazetoj donis profiton de 7300 gld. anstataŭ 8000 gld. en 1990. La valoro de la stokoj, t.e. de varoj de aliaj eldonejoj, malkreskis je 7000 gld. kaj estis jarfine 189 200 gld.

Ĉefe pro la apero de *Nova Esperanta krestomatio*, la Eldona Fakoj notis kreskon de sia neta rezulto: de 11 000 gld. en 1990 al 16 000 gld. en 1991. La stokoj de propraj eldonaĵoj de UEA valoris jarfine 414 500 gld., t.e. je preskaŭ 52 000 gld. pli ol en la fino de 1990.

POR ESTI INFORMITA...

## Eventoj

*La dusemajna internacia gazeto pri la Esperanta Movado!*  
LINGVO-Studio, H-1675 Budapest, pk. 87, Hungario

## Daŭra plifortiĝo, eksplodo de fondaĵoj

### ĜENERALAJ KONSIDEROJ

En 1991 en Nederlando la inflacio ekrapidis, post malaj tendencoj de la antaŭaj jaroj. Ĝi en 1991 atingis 3,3%. Por UEA, kun jaraj spezoj de ĉ. miliono da guldenoj, tia procentaĵo gravas: ĝi egalas ekz. al la preskosto de la Jarlibro aŭ al ĉiuj kostoj pro *Kontakto*.

Kiam la Komitato buĝetis por 1991, ĝi ne antaŭvidis tian ŝanĝon: ĝi planis 1,2% pli ol por 1990. Nun la spezokonto tamen ne registras pli altajn kostojn ol buĝetite, eĉ male: la efektivaj kostoj malsuperis la buĝeton je 1,5% (14 000 gld.), dank' al eltroviga mastrumado en la CO. Aliflanke, tamen, la rimeda parto de la buĝeto ne realiĝis laŭespero. Sed ke la Estraro kaj la CO sciis bone mastri la kostojn, praktike kompensis la breĉon inter buĝetitaj kaj realaj rimedoj. Sekve la negativa saldo de la Spezokonto, 88 000 gld., estas pli-malpli laŭ la buĝeto.

La Estraro konkludis el la spezoj, i.a. por laŭbezone reĝustigi la kotiz-tarifojn, ke ekde nun oni diskutigos la Komitaton pri kotizoj ĉiujare, ne nur ĉiun trian aŭ kvaran jaron. Okulfrapas ke en 1991 UEA devis liveri servojn al individua membraro je 5,6% pli multnombra ol en 1990, dum ĝi enspezis per kotizoj 5,2% malpli ol buĝetite. De 1990 tiuj enspezoj ja kreskis 2,7%, sed la rekorda membronombro finance ne estas rekorda. La kotizaj rimedoj devos do sekvi pli adekvate la evoluon de aliĝoj kaj de la inflacio. Por 1992 oni plialtigis la kotizojn per 12%; tio jam promesas pli bonan rezulton ol en 1991.

### SPEZOKONTO

Ĉefaj ŝparoj kompare kun la buĝeto okazis ĉe salajroj kaj rilataj kostoj (5 800 gld.) kaj ĉe oficejaj kostoj (17 800 gld.). Ĉi-lastaj falis ĝenerale, plej rimarkinde ĉe afrankoj (11 800), malgraŭ ke en julio la poŝtaj tarifoj pli ol 10-procente plialtiĝis (dank' al malpli kostaj ebloj por amasaj ekspedoj). Oni ŝparis

ankaŭ ĉe amortizoj (6 200) kaj korespondkostoj (3 000).

La elspezoj superis la buĝeton rilate la oficejan domon (3 300), revuon (3 300), Jarlibron (5 200), *Kontakton* (4 200), vojaĝkostojn (900) kaj ĝeneralajn kostojn (1 000).

Ce rimedoj la ĉefa negatavaĵo rilatis, kiel dirite, al la kotizoj, kiuj – kune kun la abonpagoj – restis 34 500 gld. sub la buĝeto. Aliaj breĉoj estas ĉe la libroservo (4 000), eldona fako (9 900), kompensoj (4 000) kaj diversaj (4 700), kie tamen notindas ke la donacoj al la Ĝenerala Kaso, 11 750 gld., pli ol 2-obliĝis de 1990.

Ne mankis tamen pozitivajoj en la rimeda flanko. Servoj produktis 24 700 gld., t.e. 50% pli ol buĝetite, la kotiz-procentaĵo de la bergena UK estis je 6 000 gld. pli alta, kaj de turismaj servoj UEA profitis je 8 500 gld. pli. Ĉe la rento la superaĵo estis 1 700 gld.

### BILANCO

En la Bilanco elstaras la evoluo de fondaĵoj. Dank' al grandanimaj donacoj, aperis novaj, kiuj malsarĝas la Spezokonton kaj ebligas novajn iniciatojn. Temas pri la Fondaĵoj Belarta – tuŝanta jam la randon de 100 000 gld. –, Biblioteka kaj Ameriko. La Volontula Fondaĵo

duobliĝis pasintjare. La etajn fondaĵojn Enciklopedio, Scienco kaj Tekniko, kaj Universala Ekspozicio la Estraro iujas utila rezigni, kaj transirigis ilian bonhavan al Fondaĵo Wüster. Same likvidiĝis Fonduso Kipro favore al la Triamonda Kongresa Fondaĵo.

Kiel antaŭvidite en la raporto pri 1990, la tiama perdo ĉe la bilancaj kontoj, rilataj al valorpaperoj, okazis nur pro la Gola krizo, kaj malaperis en la nuna Bilanco.

Kvankam la financa vivo de UEA ne malhavas problemojn, nek mankas al ĝi riskoj kaj minacoj, i.a. la kronika problemoj de negativa saldo en la Spezokonto, ĝin ĉefe karakterizas – kiel jam pasintjare – daŭra plifortiĝo, videbla en la Bilanco. Eĉ se la kapitalo malkreskis – ĉefe pro la decido de la Komitato grave malaltigi la bilancan valoron de la oficeja domo, konforme al maklerista takso – la kresko de la fondaĵoj estis eksploda. Tio, cetere, ne estis hazardo, sed rezultis el plurjara zorga engaĝiĝo ĉefe de la CO. En 1981 la kapitalo kaj fondaĵoj sumiĝis je 725 000 gld., sed en 1991 jam 1 650 500 gld. En 10 jaroj la kapitalo iĝis pli ol duobla, la totalo de fondaĵoj triobliĝis.

El la financa bonfarto de UEA sekvas ke ĝi estas sekura laboradonanto. Dank' al tio, la oficistaj dungoj daŭras pli longe, kaj la laboreto en la oficejo estas bona. Tiun ĉi homan dimension apenaŭ eblas supertaksi.

### Instituto Hodler:

## Pli da subvencioj

La ĉefa evoluo en la Instituto Hodler '68 en 1991 rilatis al la investoj, estraro kaj antaŭ ĉio al la plenumo de la origina celo: disdono de subvencioj al la Esperanto-movado. La Instituto vendis sian domon en Roterdamo en aprilo, tiel ke ĝi povis likvidi sian ŝuldon al UEA kaj denove ekinvesti en obligacioj. Ĝi plu posedas la domon Frankrijklei 140 en Antverpeno, luprenatan de Flandra E-Ligo kaj la grupo La Verda Stelo.

La Estraro de UEA nomumis nova estrarano de IH Piet Schuil el

Hooqvliet (Nederlando). Aliaj estraranoj estas G. Maertens (prezidanto), A. Mertens-Goossens (viceprezidanto), J. Verstraeten kaj C.C. van der Vlies. La Administradon prizorgas John Rapley.

Krom la "subvencioj" al UEA (en formo de puninterzorgo pro la ŝuldo), al FEL kaj la antverpena grupo (pro la prizorgado de la domo), el la rento de 1991 estis asignitaj jenaj subvencioj: E-redakcio de Pola Radio 500 gld., Praga sekcio de la Akademio Internacia de Sciencoj 750 gld., Fondaĵo Wüster 1000 gld., Eŭropa Esperanto-Unio kaj Eŭropa Esperanto-Centro 1000 gld., Akademio de Esperanto 1000 gld. kaj la Fondaĵo Canuto 2250 gld.

## La redaktoraj kraĵonoj en novaj manoj

### REVUO ESPERANTO

Mark Fettes kompletigis sian kvinan jarkolekton, forlasante la oficejon en la komenco de 1992. La posten-anoncoj altiris 17 kandidatojn, el kiuj István Ertl (Hungario) estis fine nomumita nova redaktoro.

Ĉiujn numerojn komputile prilaboris en la CO Fettes kaj kompostisto Roy McCoy, kun kontribuoj en la dua parto de la jaro de volontulo Tom Geller. Denove la aperdatoj obstine malfruis. Enspezoj por anoncoj multe falis, ĉefe pro manko de persista varbado.

Po ok pliaj paĝoj, pri esperantologio kaj pri la Esperanta muziko, estis aldonitaj al la aprila kaj julia-aŭgusta numeroj, sed la bezono ŝpari limigis ĉiujn postajn numerojn al la kutima amplekso. Okaze de la unuigo de la du germanaj E-asocioj aperis duparta artikolo pri la historio de la movado en GDR. Apartan pritrakton ricevis la kongresa lando (marto), la azia movado (apr.), instruado (jun.) kaj movada strategio (jul. kaj okt.). La Estrara Raporto plenigis la majan numeron, dum la septembra numero temis pri la Universala Kongreso.

Inter la rubrikaj elstaris la recenzoj, pri pli ol sesdek libroj kaj deko da muzikaĵoj, plus pluraj librotemaj artikoloj, i.a. omaĝoj al la jubileo de Baghy, Kalocsay, Hohlov, Deŝkin kaj Adamson, kaj intervjuoj kun aŭtoroj Claude Piron kaj Gonçalves Neves kaj eldonisto Christian Baudé. La bibliografia rubriko "Laste aperis" okupis 8 paĝojn, "Reagoj" plenigis pliajn 8. Gravan informan rolon daŭre plenumis "Loke-Fake-Persone", la kalendaro de aranĝoj, kaj "Oficiala Informilo".

Jarfine demisiis Georges Larglantier, la libervola redaktoro de la radio-rubriko. Ne malpli ol 42 jarojn li dediĉis al tiu tasko – admirinda kaj dankinda kontribuo!

Dum sia redaktoreco Mark Fettes sukcesis doni al "sia" revuo personan stilon, kiu sendube plaĉis al plimulto de la legantoj. Li aparte emfazis la rolon organizan de tiu ĉi plej prestiĝa

Esperanto-revuo, donante multan spacon al diskuto pri redifino de la movada strategio. Tion manifestis precipe la vicleco de la rubriko "Reagoj". Kiel plibonigi la revuon – tion helpis malkovri enketo, disendita en aprilo. Respondis pli ol 800 legantoj: vere reprezenta nombro. Analizo de la rezultoj aperis en la aprila numero de 1992.

### KONTAKTO

En sia dua jaro kiel redaktoro de *Kontakto* István Ertl daŭrigis la kutimon de temaj numeroj pri, resp. antikvaj mitoj, Esperanta literaturo, *Mondaj movadoj* (la temo de Internacia Junulara Kongreso) kaj "Mia popolo". La kvina kaj sesa numeroj, pri aktualaj mondkonfliktoj, aperis kunigitaj por pli rapide venki la malfruan.

Post la elekto de Ertl kiel nova redaktoro de *Esperanto*, la Estraro de UEA nomumis Francisco L. Veuthey (Argentino) lia posteulo ekde la unua numero de 1992. En TEJO okazis multa diskuto pri la estonteco de *Kontakto*, surbaze de kiu Veuthey

prezentis projekton de tute nova grafika aspekto kaj de novaj redaktorencipioj, laŭ kiuj *Kontakto* pli emfazos temojn kiuj interesas la junularon, sed plu enhavos ankaŭ facilajn tekstojn. Laŭtemaj numeroj malaperos. De la sukceso de tiu reformo sendube dependos ĉu la revuo transvivos la jaron 1993, kiam la Komitato de UEA decidis ĉu plu eldoni ĝin.

Ankaŭ en 1991 *Kontakto* estis kompostata kaj presata en la Grafika Centro Antverpeno kaj provlegata en la CO. Ekde 1992 *Kontakto* kompostiĝas en la Centra Oficejo.

### ESPERANTO-DOKUMENTOJ

Enoficiĝis nova redaktoro de la serio, Thomas Bormann, kiu faris planon pri estontaj kajeroj. Pluraj el ili pretis en manuskripto jam en 1991, kvankam efektive eliris nur *Al unu lingvo por Eŭropo: La estonteco de la eŭropa Babelo* de Mark Fettes, per kiu li gajnis prestiĝan ekstermovadan premion. Ĝi aperis en ĉiuj tri serioj: Esperanta, angla kaj franca, kaj montriĝis unu el la plej popularaj *Esperanto-dokumentoj*. Ekster UEA ĝi jam aperis ankaŭ en la lingvoj bulgara, germana (en Aŭstrio) kaj hispana (en Kubo); estis anoncita ankaŭ portugala eldono.

*Post sesdeko da numeroj Mark Fettes pludonis la stafeton de Esperanto al István Ertl.*



## Pli liberaj sed ne pli riĉaj orient-eŭropanoj

### LA 76-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

La 76-a Universala Kongreso de Esperanto disvolviĝis de la 27-a de julio ĝis la 3-a de aŭgusto en Bergeno (Norvegio). La festaj kaj artaj aranĝoj okazis ĉefe en la koncertejo *Grieghallen*, dum la proksima Studenta Centro servis por malpli grandaj laborkursidoj. La kondiĉoj estis tre, foje eĉ tro bonaj, ĉar la malnorvege varmega suno banis la urbon tra la tuta semajno kaj faris kelkajn kunsidojn laŭvorte ŝvitigaj.

La Alta Protektanto estis Jo Benkow, prezidanto de la parlamento. Federico Mayor, ĝenerala direktoro de Unesko, letere salutis la Kongreson. Kvankam plej altaj ŝtataj gvidantoj ĉi-foje ne aperis en la Kongreso, tamen ankaŭ la Bergena UK fariĝis unu el la plej atentataj eventoj en sia lando, pro kaŭzo kiu bone ilustris la ŝanĝiĝojn en Eŭropo. Alveno de litovaj kaj rusaj kongresanoj per sovietia ŝipo kiun la norvegaj defendo-instancoj klasifikis spiona, embarasis ne nur la ŝtatan burokraton sed ankaŭ UEA kaj LKK. Por la amaskomunikiloj la incidento prezentis bonvenan sensation en novaĵ-malriĉa periodo. Ĉio finiĝis bone; la ŝipanoj gajnis simpatian kaj helpeman solidarecon de la neesperantista publiko en Bergeno, alboridiĝis en la tria tago kaj ekkongresis. Krom tiu ĉi novaĵbombo menciindas la ĉiutaga Esperanta novaĵrubriko en la ĵurnalo *Bergens Arbeiderblad*.

Entute al la 76-a UK aliĝis 2295 homoj el 55 landoj. La multnombra partopreno de kongresanoj el eks-socialismaj landoj kaj la malapero de politikaj baroj, kiu tion ebligis, estis salutitaj en unu el la kongresaj rezolucioj. Subita amasiĝo de orient-eŭropaj kongresanoj tamen kunportas ankaŭ problemojn. Unu el ili montriĝis la bazon, kiun nek permesite nek malpermesite starigis en la kongresejo orient-eŭropanoj urĝe bezonantaj kronojn en la multekosta

lando. Urĝite de la komitatitaj revizoroj, UEA enkondukis nun pli singardan politikon pri dissendo de invitiloj, ĉar la riskoj kiujn ili implicas fariĝis pli grandaj en la nunaj cirkonstancoj.

La temo de la UK "Nordio – ĉu modelo?" estis pritraktata el plej diversaj vidpunktoj: kultura, turisma, trafika, edukada, scienca, jura, ekonomia, mediprotektada kaj junulara. Ĉion lerte reĝisoris Balduur Ragnarsson, kiu enkondukis la diskutojn per artikolo en la Kongresa Libro. Kvankam en la diskutoj levigis ankaŭ kritikaj voĉoj, oni ĝenerale konsentis pri la superreĝo de pozitivaj trajtoj en la nordia vivo. Laŭ la koncerna rezolucio, precipe la harmonia kunlaboro inter la nordiaj landoj prezentas modelon por ĉiuj.

La forta orienta ĉeesto aparte bone videblis en la kulturaj programoj: latvoj, rusoj kaj kantista paro Ĵomart kaj Nataŝa el Kazahio alportis ion freŝan kaj viglan el siaj propraj movadaj tradicioj, certe fremdaj al multaj okcidentaj aŭskultantoj. Inter la okcidentaj kontribuoj al la kultura parto de la UK elstaris la prezentado de la teatraĵo "Pupohejmo" de la norvega klasikulo Henrik Ibsen. La aktoroj de "Kia koincido" rikoltis ne nur varmajn

aplaŭdojn, sed ankaŭ ampleksan laŭdan artikolon en grava loka ĵurnalo. Modele kunmetita estis la Nacia Vespero, dum en la pli ŝablona Internacia Vespero ĉef-eventis la premiero de *La plenumo*, korusa verko de Crawford Gates laŭ la teksto de William Auld.

La 44-a sesio de la Internacia Kongresa Univeritato havis malpli da prelegoj ol kutime: nur ok. M. Fettes kaj D. Draper reĝisoris por okdek-kapa publiko la Tago de la Paco kun la temo "Pozitivaj paŝoj al vivinda mondo", pri kiu ĉefprelegis konata norvega pacaktivulo Eva Nordland. La ĉefa temo de la Tago de la Lernejo, "Konsciigo pri la lingvoproblemoj en la E-instruado", povis esti nur haste traktita pro densiĝo de la programo.


Cefe la multekosteco de la lando kulpis ke la kongresa libroservo enspezis nur duonon de la kutima sumo, nome 45 000 gld. La plej vendita varo estis la kasedo de Ĵomart kaj Nataŝa. Ĝenerale la financa rezulto de la kongreso estis tre bona, malgraŭ multaj timoj.

En la ĝenerala prijuĝo, nepre pozitiva, ne eblas forgesi la rolon de la aktiva LKK kaj de ĝia prezidanto, Elna Matland. Dank' al ili la UK povis tiom sukcesi en urbo kaj lando kies movado ne estas tre forta.

### INTERNACIA INFANA KONGRESETO

En la proksima Hylkje okazis samtempe kun la UK la 26-a Internacia Infana Kongreseto, kun 37

*Preskaŭ "denaskaj kongresantoj"...*





infanoj el 17 landoj. La kongreset-anaro inkluzivis eĉ 11 denaskajn parolantojn de Esperanto. La organizantoj Kristoforo Fettes kaj Heleno Fantom programis plej diversajn aktivajojn: ludojn, muzikadon, faradon de metiartaĵoj, redaktadon de propra gazeto, du ekskursojn ktp. Sepdeko da UK-anoj vizitis la IJK, kies junaj anoj siavice salutis la plenreskulan kongreson en ties ferno.

#### 47-A INTERNACIA JUNULARA KONGRESO

La 47-a Internacia Junulara Kongreso okazis de la 20-a ĝis la 26-a de julio en Karlskoga (Svedio) kun la temo "Mondaj movadoj". La popola atlernejo, kiu jam famiĝis por siaj regulaj Esperanto-kursoj, estis tre oportuna por loĝado kaj kongresaj laboroj. Aligis 180 gejunuloj el 35 landoj. Diference de la UK, ĉeestis tre malmultaj el orient-eŭropaj landoj, sendube pro la famo de la svedia multekosteco. Tamen, sovietianoj venis pli ol kutime: tuta deko.

#### ESTONTAJ KONGRESOJ

La 77-a Universala Kongreso okazos en Vieno de la 25-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto 1992. Decidi pri la kongresurbo eblis nur en februaro 1991 post urĝaj esploroj, komencitaj post la definitivego de la neoblo kongresi en Prago. La Centra Oficejo devis preni sur sin pli grandan organizan ŝarĝon ol kutime, pro la malforteco de la aŭstra movado kaj tial ke la iniciato kongresi tie ne venis de la lando mem.

La Estraro akceptis la inviton aranĝi la 78-an UK en Valencio (Hispanio) de la 24-a ĝis la 31-a de julio 1993. La invito kongresi en Seulo (Koreio) en 1994 ne estis matura por fina akcepto, dum pli bone progresis preparoj por la UK en Tampere (Finnlando) en 1995.

#### ALIAJ ARANĜOJ

Al la 76-a UK enkondukis antaŭkongreso en Oslo, tiel furore sukcesa ke jam en la mara numero de la revuo necesis anonci la elĉerpigon de rezerveblaj lokoj. Same sukcesa estis la oficiala postkongreso en Islando, kiun Islanda E-Asocio realigis vere laŭdirinde.

#### Informado:

## Modernigo, konkretigo, aktualigo

#### INFORMA FAKO

Trifoje aperis la bulteno *Influo*, dissendata al ducento da inform-aktivuloj. Ĝiaj kajeroj enhavis konsilaretojn pri starigo de ekspozicio, pri sinpreparo por intervjuo, kaj pri rilatado kun amaskomunikiloj. *Internaciaj novaĵoj*, komunikoj pri movadaj aktualaĵoj, kiujn aktivuloj proponu al la nemovada gazetaro, aperis 8-foje. Ili lanĉiĝis reage al daŭraj petoj; ŝajnas tamen ke ne tiom utiligas ilin kiom dezirinde.

Dum la UK la enlanda informado funkciis tre bone dank' al la soveta ŝipo, sed ankaŭ dank' al la spertaj profesiuloj LKK-anoj T. Kvakland kaj C. Fossen. La internacia gazetara servo de la UK same kiel la Kongresa Kuriero kaj la dumkongresaj kunsidoj pri informado tamen ne plenumis la esperojn de la IF. Sekve ĝi dediĉis atenton al ilia pli kontentiga funkciigo en Vieno.

En 1991 eliris la unua "konsilario por aktivuloj", *Kiel diskonigi vian asocion*, kiun G. Pirlot elfranciĝis kaj la IF adaptis al movadaj bezonoj. Ĉiu landa asocio ricevis ĝin senpage; en la libroservo ĝi furoris. La angla-lingva baza informilo *Update* aperis ĝisdatigita. Ankaŭ finnoj aktualigis ĝin, sed restas esperi ke pli da landaj asocioj aperigos ĝin sialingve.

En la januara *Esperanto* la estraro pri informado, I. Durwael, ekigis debaton pri la modernigo de la publika bildo pri Esperanto. El la multaj reagoj menciindas la daŭra rezisto kontraŭ la uzo de la jubilea simbolo. UEA mem favoras ĉi tiun novan, pli modernan kaj elvokivan simbolon. UEA tamen uzas ĝin apud, ne anstataŭ la stelo. Neniu oficiala anstataŭaĵo estis decidita.

La informa agado de TEJO vligiĝis sub ĝia estrarano pri informado, Thomas Pusch, kiu pasintjare komencis plenan revizion de ĉiuj junularaj varbmaterialoj.

#### LOKA AGADO

La Informa Fako denove enketis inter la ricevantoj de *Influo* pri ilia informa agado. La rezultoj, analizitaj

en n-ro 7 de *Influo*, montris pli pozitivan bildon ol la antaŭa enketo. Ŝajnas ke la inform-agantoj nun agas pli sisteme ol antaŭe. Ekz., la planoj por 1991/92 estis multe pli konkretaj ol en la antaŭa jaro. Notindas, eĉ se ne surprizas, ke 43% de la respondoj menciis kiel la plej gravan konkurencon por la informado la popularecon de la angla.

Laŭ la enketo la informado – se juĝi laŭ la kvanto de amaskomunikilaj aperoj kaj laŭ la nombro de informpetoj – plej intensas en Britio, Germanio, Usono, Nederlando, Italio, Flandrio, Kroatio kaj Kubo.

Lastatempe ĉiam pli ofte esperantistoj ĉeestis en lingvoforoj. La IF okazigis en Bergen kunsidon kie aktivuloj el Aŭstrio, Belgio, Britio, Francio, Germanio, Hungario, Italio, Kubo kaj Portugalio raportis pri siaj, ĝenerale tre pozitivaj, spertoj. Lingvoforojn oni partoprenis ankaŭ en Brazilo kaj Svislando.

Ekzemplodona estis la informado ĉe ekspozicio pri la bildstria herod (Tinĉjo, kie grupanoj de Welkenraedt (Belgio) vekis multan gazetaran eĥon. La ekspozicio migros plu; oni do uzu la ŝancon ankaŭ aliloke. Laŭ itala iniciato, en oktobro okazis la trian fojon stratataj manifestacioj ĉe la sidejo de la naciaj radioj-televidoj, ĉi-foje en Romo, Bruselo kaj Londono. Ĉi-jare, la 10-an de oktobro, tiaj manifestacioj espereble atentigos eĉ pli da radiokompanioj pri la lingva problemoj kaj Esperanto.

Daŭris la teleteksta informado pri la E-movado ĉe la Slovena Televido, ekinta jam en decembro 1989 kaj prizorgata de Marija Zlatnar kaj Janez Jug. La malpligo de E-elsendoj de la Pola Radio, sekvota en 1992 de limigo ĉe la Estona Radio kaj ĉesigo ĉe la Svisa kaj Zagreba – dum, bonŝance, en Havano pliiĝas la elsendotempo – devus alarmi ĉiun esperantiston al regula aŭskultado kaj skribado al la stacioj kiuj dissendas en Esperanto. Perdo de pozicioj en radiofonio estas grava bato por la aplikado kaj por la prestiĝo de la lingvo.

## Prete al gravaj debatoj

### UNUIĜINTAJ NACIOJ

La nova internacia situacio malfermas novajn perspektivojn por Esperanto ĉe Unuiĝintaj Nacioj: kutimaj labormetodoj kaj proceduroj iĝas modifindaj, kaj tiel malfermiĝas la eblo de nova debato pri la uzo de lingvoj en UN. La laborgrupo ĉe UN, kiu konsistas el areto da UEA-aktivuloj, sin pretigas por tiu debato. Dum la jaro la anoj de la grupo agadis en la laboro de la neregistaraj organizaĵoj ĉe UN, ekz. membrante en la komitato de NRO-j por la Universitato de Paco en Kostariko. Tamen, la laboron plu malhelpas sciomanko kaj antaŭjuĝoj pri Esperanto en la internacia komunumo. Ekz., la laborgrupo devis fakte kampanji por akceptigi UEA kiel agnoskitan NRO en la junio (1992) konferenco de UN pri la homa medio en Rio-de-Janeiro. Aliflanke, la kampanjo ja sukcesis, tiel ke UEA fariĝis unu el la 69 NRO-j tiel agnoskitaj.

En decembro, en Zamenhof-taga ceremonio la Premio Zamenhof por Internacia Kompreniĝo estis transdonita al la konata diplomato kaj laboranto por la paco Sir Brian Urquhart (vd. *Esperanto* jan. '92).

En novembro UEA estis reprezentita de s-ro Llibert Puig en la 33-a Plenkunveno de la Monda Federacio de UN-Asocioj en Barcelono.

### UNESKO

En oktobro/novembro okazis en Parizo la 26-a Ĝenerala Konferenco de Unesko; la delegacion de UEA konsistigis Barbara Despiny, François Lo Jacomo kaj Jan Koszmaluk.

Kiel UEA-observanto Ernő Csiszár ĉeestis la 17-an Kongreson de la Federacio de Lingvoinstruistoj en Pécs (Hungario) aŭguste, aparte la sekcion pri la projekto "Linguapax" de Unesko, kiu celas konsciigi la ligan inter lingvo-instruado kaj eduko je internacia amikeco.

Dum la UK fondiĝis Monda Kunagado por Eduko, Scienco kaj Kulturo, unuavice por esperantistoj kiuj volas de sube kontribui al la realigo de la celoj de Unesko. Ekaperis ĝia

organo, *Monda Forumo*. Tricento jam membriĝis en tiu ĉi organizaĵo, kiu petis akcepton kiel aliĝinta faka asocio de UEA.

Je loka nivelo, la Germana Esperanto-Junularo partoprenis en ekspozicio de la Unesko-grupo en Bonno pri la temo alfabetigo.

### EŬROPAJ INSTANCOJ

La rilatojn de UEA al la Eŭropa Konsilio (Strasburgo) prizorgis Rainer Heckhausen kaj Daniel König.

Rilate la agadon ĉe la Eŭropa Komunumo, la laborgrupo konsistanta el Grégoire Maertens, Edward Symoens kaj Hans Erasmus ellaboris priskribon de sia projekto "Komunikado en la Eŭropa Komunumo", kiu analizas la lingvoproblemon en EK kaj por solvi ĝin proponas studi la rolon de Esperanto. La dokumento estis submetita al diskuto kaj baldaŭ distribuigis en pluraj lingvoj (vd. la revuon, 1991, p.135).

En Italio la Radikala Partio alvokas al plurnacia politika batalo por leĝoj favoraj al Esperanto. Ĝi varbas por sia strategio per vaste dissendataj gazetoj, kiuj aperas en kelkaj lingvoj, inkl. de Esperanto.

Loka grupo en Kronach (Germanio) organizis kun la samurba filio de Eŭropa Unio seminarion pri la lingva problemo en Eŭropo.

### ALIAJ AGADOJ

En kelkaj landoj, ekz. Francio, Irlando, Italio kaj Ukrainio, anoj de la ekologie engaĝitaj Verdulaj Partioj simpatias Esperanton. Dum la jar-kongreso de la Eŭropaj Verduloj junio en Zuriko Esperanto estis laborlingvo – apud la angla, franca kaj germana – dum la plenkunsidoj.

Enketo pri la eksteraj rilatoj de la Landaj Asocioj montris ke pluraj el ili kolektive membras en organizaĵoj kiel UN-asocioj, eŭropa movado aŭ klerigaj societoj. Ili kunlaboras kun similkarakteraj asocioj, aliĝante al publikaj procesioj aŭ malfermante informbudojn okaze de ili. La kunagado, ekz. per komunaj aranĝoj, ofte subtenis eksteraj subvencioj.



Landa kaj regiona agado:

## Perdo de pionira rolo en Eŭropo

### EŬROPO

La nomo kaj precipe Eŭropo en 1991 estis tute alia ol antaŭ kelkaj jaroj. Preskaŭ duonon de la aligita membraro de UEA tuis la politikaj ŝanĝoj startintaj per la perestrojko. De la Esperanto-asocioj en Meza kaj Orienta Eŭropo tiuj ŝanĝoj postulas adapton kaj retakson de sia agado, sed ne nur de ili: pro la granda pezo – organiza kaj kultura – kiun la tiuregiona movado havis en internacia skalo, la tuta movado devas reagi. Tiaj adapto kaj retaksado tamen apenaŭ okazas, kvankam oni ja rimarkas provojn de pli organizita aliro al tiu problemaro.

La Unua Ĝenerala Kunsido en Bergeno vaste diskutis pri la nova situacio. Rezultis tamen nur rekomendo al la landaj asocioj de Eŭropo pri la interŝanĝo de spertoj por venki la malfacilaĵojn fontantajn el la politikaj ŝanĝoj, kaj raportoj pri la rezultoj post unu jaro. Pli profundajn diskutojn celis ebligi la 2-a Eŭropa Esperanto-Forumo, kiu okazis, laŭ invito de Litova E-Asocio, de la 28-a de septembro ĝis la 5-a de

*En Bjelorusio, reorganiziganta landa movado celas instaligi en Grodno, en domo kie Zamenhof loĝis kvar jarojn.*



oktobro en Kaunas. Partoprenis kelkdeko da aktivuloj, sed tiuj el ekster Baltio apenaŭ venis. La gravecon por UEA de la aranĝo kaj ĝia celo montris ke tri estraranoj (Dobrzyński, Lins kaj Princz) partoprenis. La manko de okcident-eŭropanoj bone ekzemplas la nuntempan paradokson: antaŭe nia movado pioniris pri viglaj rilatoj inter la Okcidento kaj Oriento de Eŭropo – nun la okcidentanojn kaj iliajn asociojn karakterizas senkonsileco kaj neglektemo tiurilate, dum okcidentaj politikistoj pli kaj pli konscias pri la urĝa neceso helpi la orient-eŭropajn landojn.

Esperanto perdas poziciojn en la eks-socialismaj landoj. Ekzemple: la landa asocio de Bulgario devis maldungi la tutan stabon de sia centra oficejo, kaj maldungoj okazis ankaŭ en la pola asocio. PEA devis translokiĝi al pli modesta ejo, kaj simila sorto atendis la hungaran asocion, dum la ĉeĥa devis grandparte luigi sian oficejon. Pola Radio draste limigis siajn E-elsendojn. Unu el la plej atkvalitaj E-gazetoj, *Hungara vivo*, same kiel la scienpopulariga *Fokuso*, ĉesis aperi, kaj la vigla eldonado ĉe HEA forvelkis. Esperantotur baraktas en financaj problemoj; aliaj turismaj centroj kaj tradiciaj aranĝoj estas minacataj aŭ jam forfalas. Post la malapero de

GDRREA esperable la tŭrgermana asocio sukcesos almenaŭ parte reteni la iaman prestiĝon en la sciencistaj rondoj de GDR.

Feliĉe, en la alia pesil-taso sidas ankaŭ la plivigligo de la movado en Rumanio kaj Albanio, kie la antaŭaj baroj malaperis. En 1991 fondiĝis Albana Esperanto-Ligo, eliris la unuaj numeroj de *Albana Esperantisto* kaj aperis lernolibro. Laŭdinde, ankaŭ la eks-sovetaj landoj provas trovi taŭgajn agadmanierojn. Ĝojigas ankaŭ la parta forfalo de obstakloj malfaciligintaj la partoprenon de orient-eŭropanoj en internaciaj renkontigoj.

La inicietemo de okcident-eŭropaj movadanoj rilate la orientan parton de la kontinento estas do kritikinda, sed multo restas farenda ankaŭ por la kunlaboro ene de okcidenta Eŭropo mem. Regiona kunagado bone evoluas nur en Nordio, kies landaj asocioj jam de kelkaj jaroj funkciigas konstantan kunlaboran komisionon. Ja disvolviĝas konkreta projekto pri komunikado en la Eŭropa Komunumo, sed kunlaboro inter aliaj landaj asocioj apenaŭ ĝermas. Kial ekzemple la germana kaj franca asocioj neniel reflektas la proksiman rilatatadon de la koncernaj ŝtatoj? El Italio tamen venis invito por Eŭropa Esperanto-Kongreso en Verono junio 1992, kio espereble signifas konsciigon pri la neceso de komuna kunordigita agado.

## AZIO

Estrarano So Gilsu sukcese daŭrigis siajn projektojn pri la movado en Azio: membriĝi tieajn aktivulojn en UEA, helpi partoprenigi ilin en internaciaj aranĝoj ktp. (vd. *Esperanto*, 1991, p.63-64). Jam sep numeroj aperis de la bulteno *Esperanto en Azio* (ekde n-ro 6 redaktata de ges-roj Doj en Japanio), kaj pere de la Fondaĵo Azio UEA povis en 1991 sendi lernilojn kaj aliajn librojn, je la valoro de 6 000 gld., al 13 aziaj landoj. La pola Esperanto-sendito Joachim Werdin instruis preskaŭ la tutan jaron en aziaj landoj, aparte utile en Nepalo kaj Tajvano. Reza Hejir-Hah el Irano gvidis kursojn en Ĉinio, Koreio kaj Japanio.

Ekstis movado en Kamboĝo, kie post la unuaj Esperanto-kursoj, UEA unuafaje ekhavis individuajn membrojn. En Nepalo fondiĝis landa asocio. Vigliĝis la agado en Mongolio kaj precipe en Vjetnamio, kie ekaperis tre bele eldonita revuo *Vjetnamio*. Laŭdinde evoluis la korea movado: la individua UEA-membraro kreskis per duono, kreiĝis novaj strukturoj por perado de libroj, kaj KEA sukcese kampanjis por financi la akiron de propra domo. Kontaktoj inter UEA kaj aziaj movadoj intensiĝis la vizitoj de U. Lins al Irano kaj Vjetnamio, S. Štimec al Irano kaj S. Milojević al Nepalo.

Fondaĵo Azio produktas jare interezon de ĉ. 40 000 gld., kio estas firma bazo por sproni la evoluon de la azia movado. Multaj japanoj kontribuis per tre rimarkindaj donacoj por aligi al UEA esperantistojn en malriĉaj landoj de Azio.

## OCEANIO

Nova geografia unuo aperis sur la mapo de UEA pasintjare: Nov-Kaledonio, kie ges-roj Robineau el Francio diskonigis kaj instruis Esperanton. Post ilia foriro restis ĝermo de movado tie, kaj kelkaj jam aliĝis al UEA.

## AFRIKO

Post la Unua Afrika Kongreso fine de 1990 en Togolando, novan organizan ŝtupon signifis fine de 1991 la Dua AK en Cotonou, Benino, kun 71 afrikaj aktivuloj kaj 19 gastoj el Eŭropo. Kvazaŭ daŭrigo de la kongreso okazis en Ebura Bordo. La ĝenerala direktoro reprezentis UEA en ambaŭ ĉi-lastaj aranĝoj (vd. en *Esperanto*, 1992, p. 4). La Tria AK okazos en Ganao, sed la intervalo kreskos de unu al du jaroj.

La agado ĝenerale glate progresas, la komisiito Hans Bakker plu emfazas, prefere al varbado, la kvalitan plialtigon, organizan kaj lingvan. Precipe vige agadas Togolando, sed antaŭeniras la movado ankaŭ en Benino, Ebura Bordo, Kamerunio kaj Tanzanio. La zairian movadon karakterizas maturiĝo kaj memstareco; tio bone manifestiĝis en la ĝenerala asembleo de Zairia E-Instituto en decembro 1990. Kamerunio kaj Togolando jam pretiĝas por peti aliĝon al UEA.

Junulo el Tanzanio, Costantine S. Mashauri, partoprenis la IJK kaj UK kun stipendio de Unesko, kaj prelegis en kluboj de Svedio. Por informi subtenemulojn de la afrika movado, H. Bakker kompilis konsilaron *Agi en eksterafrikujo*, kiu aperis per subvencio de la Fondaĵo FAME.

## AMERIKO

En Kanado agadis ĉefe regionaj kaj lokaj organizaĵoj, dum la landa asocio suferis krizon. La usona ELNA plu distingiĝis per profesivelelaj organizaĵoj kaj informado; post renovigo ĝia gazeto iĝis unu el la plej interesaj kaj bone redaktataj E-gazetoj. Malgraŭ la premaj ekono-

maj kondiĉoj, Kuba E-Asocio daŭre vigle aktivas sub la nova estraro elektrita en januaro 1991 kaj kun klarvide formulita laborstrategio por 1991-93. Studentoj de la Universitato de Kostariko komencis multflankan agadon, kiun UEA helpis i.a. per granda librodonaco al la universitata biblioteko.

En Meksiko okazis tre salutinda evento: repaciĝis la du konkurencaj asocioj, kun la rezulto ke en Meksika E-Federacio junaj fortoj transprenis la gvidon. Tio povus ekzempli por aliaj landoj kun organiza dueco, ekz. Argentino, kie apud la landa asocio de UEA, Argentina E-Ligo, funkcias Argentina E-Asocio kun juna membraro. Apartaĵo de AEA estas kun-

laboro kun la sudbrasilaj movado. AEA-aktivulo Atiljo O. Rojas jam de jaroj vojaĝante instruas en Sudameriko, pasintjare en Brazilo, kie alia AEA-ano, F. Veuthey, agadis du plenajn jarojn.

Brazilo E-Ligo gajnis en 1991 la Trofeon Fyne pro la granda kresko de sia individua membraro, kiun rezulton pleje motoris ĉefdelegito Jorge das Neves. En tiu vasta federa lando kreiĝis sistemo de regionaj delegitoj, cele al pli efikaj membrovarbado kaj funkciigo de la delegita reto. Novan antaŭenpuŝon la movado ricevis en la nord-oriento, kie la asocioj de la unuopaj federaj ŝtatoj decidis kunordigi sian agadon kaj i.a. ekaperigis komunan organon.

## Junulara sekcio:

# Nova estraro ne bambas sed planas

La pozitivaj tendencoj en TEJO, kiujn registris la raporto pri 1990, plifortiĝis en 1991, kiam ankaŭ la individua membraro de TEJO forte kreskis. Sendube TEJO nun estas unu el la plej vigle evoluantaj UEA-partoj.

## STRUKTURO KAJ GVIDADO

La komitato kunsidis dum la IJK kun ĉeesto de 27 membroj, kiuj i.a. elektis novan estraron. Post multjara agado en TEJO retiriĝis prezidanto Jan Koszmaluk, kasisto Hardo Bourguignon kaj estrarano Claude Rouget. La nova estraro konsistas el prezidanto Saskia Idzerda (Nederlando; kongresoj, kulturo), vicprezidantoj Andy Künzli (Svislando; landa agado) kaj Sabira Ståhlberg (Finnlando; eksteraj rilatoj), ĝenerala sekretario Yves Bellefeuille (Kanado), kasisto Danny ten Haaf (Nederlando) kaj la membroj Torsten Bendias (Germanio; aktivila trejnado), Thomas Pusch (Germanio; informado) kaj Andrej Ananjin (Rusio; aktivila trejnado, kunlaboro oriento-okcidento). La nova estraro kunsidis en la Centra Oficejo en septembro, krome okazis neoficialaj kunsidoj inter la ĉeestantaj estraranoj dum la KER-seminario en La Chaux-de-Fonds kaj la Internacia Seminario

de GEJ en Cuxhaven. Estis nomumitaj ankaŭ tri komisiitoj: Karl Jagdis (Britio) pri afrika agado, Katrin Mattusch (Germanio) pri faka agado, kaj Anna Ritamäki (Finnlando) pri reprezentigoj.

En la Komitato de UEA ties junulara sekcio reprezentis kiel Akomitatanoj Martin Haase kaj Jan Koszmaluk; ĉi-lastan anstataŭis en la kunsidoj en Bergeno S. Ståhlberg. Por la mandatperiodo 1992-95 estis nomumitaj Y. Bellefeuille kaj S. Ståhlberg. Kiel observanto de TEJO ĉe la estrarkunsidoj de UEA funkcias J. Koszmaluk, poste S. Idzerda. La respondeca estrarano de UEA pri junularo estis G. Maertens.

Ĝis meze de septembro Bianca Jacobsen laboris kiel partatempa volontulo de TEJO en la CO. Ŝi prizorgis la korespondadon kaj ĉiujn oficejajn rutinaĵojn, sed ŝia plej grava kaj temporaba laboro konsistis en la redaktado de la Pasporta Servo.

En 1991 TEJO havis 867 individuajn membrojn (la kategorioj MJ-K, MA-K kaj DM-K de UEA), t.e. 124 pli ol en 1990. Sekve la junularaj kategorioj kreskis proporcie eĉ pli ol la cetera membraro de UEA. Ĉe aligitaj membroj tamen okazis same negativa evoluo kiel ĉe tiuj de UEA:

de 6329 en la antaŭa jaro ili falis al 4026 en 1991. La kotizon de Patrono de TEJO pagis 63 mecenatoj, por kiuj en la UK okazis speciala akcepto. (Pri detaloj vd. ĉap. "Ĝeneralaĵoj" kaj *Esperanto* 1992, p.46.)

La decidon el 1990, pri "La Bamba" kiel oficiala himno de TEJO, nuligis la komitato en Karlskoga.

## LANDAJ SEKCIOJ

En Karlskoga la komitato akceptis novan landan sekciojn: Haitian Esperantistojn Junularan Asocion - HEJA. Rezulte TEJO nun havas 33 aliĝintajn landajn sekciojn kaj 2 fakajn sekciojn. Krome ĝi kontaktas junularajn E-organizaĵojn en multaj landoj, inter kiuj la plej novaj estas tiuj en Albanio, Portugalio kaj Rumanio.

Multaj orient-eŭropaj landaj sekcioj spertas malfacilan periodon. Pozitivis tamen la unua Mezeŭropa Junulara Konferenco, organizita de Germana E-Junularo fine de septembro en Radebeul. Partoprenis ĝin reprezentantoj de la landaj sekcioj en Aŭstrio, Ĉeĥio, Germanio, Hungario, Italio, Svislando kaj (tiam) Sovetio. Ili diskutis la eblecon de regiona kunlaboro, kiu plu konkretiĝos per kaj dum la MEJS, Mezeŭropa Junulara Semajno, okazota aŭguste 1992 en Olomouc (Ĉeĥoslovakio).

Alia kunlaboro inter kelkaj eŭropaj sekcioj okazas pri la "Dorsosaka Projekto", subvenciata de la Eŭropa

Junulara Fondaĵo. Temas ĉi plengilo de po unu dorsosako por ĉiu lando per informiloj pri Esperanto (libroj, revuoj, artikoloj).

## ELDONAĴOJ

La ĉefa servo al la individuaj membroj, aldone al tiuj pro la membreco en UEA, estas la sendado de la revuoj *Kontakto* kaj *TEJO tutmonde*. Pri *Kontakto* vd. la ĉap. "Periodaĵoj". *TEJO tutmonde* aperis en 1991 en ses numeroj, redaktitaj de Andy Künzli kaj grafike prizorgitaj de la Grafika Centro Antverpeno. *TT* denove bone plenumis sian funkcion kiel distribuanto de informoj pri la agado de TEJO kaj de junularaj E-organizaĵoj, ne nur la landaj sekcioj de TEJO. Kune kun *TT* estis dissendita al la membroj broŝuro, kiu prezentis la novajn estraranojn, komisiitojn kaj aliajn kunlaborantojn de TEJO por vortoj kaj fotoj. Ĉar A. Künzli demisiis de la redaktoreco, la estraro nomumis lia posteulo Klaus Dahmann (Germanio). Estis ankaŭ decidite aperigi ekde 1992 ne ses sed kvar, grafike pli belajn numerojn. La nova redaktoro entuziasme eklaboris kaj sukcesis prezenti sian unuan numeron (1/92) jam fine de 1991. Helpas lin stabo de regionaj redaktoroj tra la mondo.

En junio aperis listo de la gastigantoj de Pasporta Servo, kiun la vojaĝemuloj vane atendis en 1990. Ĝi iĝis la plej impona el ĉiuj ĝisnunaj: 1159 adresoj en 59 landoj. Ĉar dum unu jaro la administrado de la Servo estis neglektita, multaj el la adresoj iĝis dubindaj. Por forigi ilin, en oktobro dissendiĝis poŝtkarto al ĉiuj gastigantoj kiuj ĝis tiam ne resendis re-aligilon. Ekde septembro la servon prizorgis Rob Keetlaer (Nederlando).

## INTERNACIA JUNULARA KONGRESO

La 47-a Internacia Junulara Kongreso okazis de la 20-a ĝis la 26-a de julio en la sveda urbo Karlskoga (vd. ĉap. "Kongresoj kaj turismo"). La 48-a IJK havos lokon en Montrealeo (Kanado), de la 2-a ĝis la 9-a de aŭgusto 1992 kun la temo "Liber-tempado". En Karlskoga la komitato rezervis 1500 gld. kiel subvencion por latin-amerikano partoprenonta en Montrealeo. Vraca (Bulgario)

invitas la IJK de 1993, dum tiu de 1994 verŝajne okazos en Koreio same kiel la UK. Venis jam invito eĉ por 1995, de Germana E-Junularo.

## KOMISIONO PRI EKSTERAJ RILATOJ

TEJO daŭre estas en bonaj rilatoj kun diversaj eŭropaj instancoj. Tio i.a. ebligas al ĝi organizi tre altkvalitajn seminariojn kun malaltaj kotizoj, dank' al ricevataj subvencioj.



*Eks-prezidanto Jan Koszmaluk stafetis TEJO-n al Saskia Idzerda.*

En majo okazis en Strasburgo, ĉe la Eŭropa Junulara Centro kaj kun ĝia subteno, seminario pri la temo "Komuna Eŭropa domo"; alia seminario en novembro 1991 debatis en La Chaux-de-Fonds pri la temo "Neŭtraleco – ĉu alternativo al ideologioj?" Planoj pri similaj aranĝoj en 1992 kaj 1993 jam

progresa. Kunlaboro kun la Eŭropa Junulara Centro ebligas ĉiujare al kelkaj aktivuloj de TEJO studi en tre efikaj lingvokursoj kiujn ĝi ofertas.

Oktobre en Rumanio S. Ståhlberg partoprenis, kun la rumana observantino Rodica Popa, konsultigon de junularaj asocioj en konsultaj rilatoj kun Unesko. Aparte ambicia estas la alfabetiga projekto en Togolando (vd. *Esperanto*, feb. '92, p. 35), kies preparado komenciĝis en 1991. La realiĝo de tiu projekto dependas ankoraŭ de la rezultoj de subvenci-petoj, sed la planado bone evoluas, ĉefe dank' al la entuziasmo de togolandanoj mem.

## KULTURO

TEJO bedaŭrinde ĝis nun ne sukcesis starigi propran kulturen agadon, kvankam aliflanke en ĉiuj ĝiaj aranĝoj kaj eldonaĵoj kulturo grave rolas. Tamen Eŭroka, ĝia aliĝinta faka asocio, vige kontaktigas la rokmuzikantojn de Esperantujo kaj eldonas la buntan revuon *Rok'gazet'*. Konkretaj ideoj pri kultura agado kiujn malgranda grupo povus ellabori estas bonvenaj.

## KONKLUDE

Espereble la nuna pozitiva evoluo de TEJO instigos pliajn gejunulojn al kunlaboro en la organizo. Nur tiel eblos daŭrigi kaj kreskigi la agadon sur alta nivelo. La revigliĝo dum la lasta jaro nutras la esperon ke komenciĝis nova, prospera ĉapitro en la historio de TEJO.

## APERAS 2-SEMAJNE!

# Eventoj

*Sendependa internacia gazeto pri la Esperanto-Movado!*

*Aktualaj informoj, eventoj, faka aplikado, kaj represo de elektitaj artikoloj el la esperanta gazetaro.*

*Aperas ekde marto, kotizperantoj en 22 landoj.*

*Aboneblo ankaŭ por la dua duonjaro en 1992!*

*Petu provekzempleron de: LINGVO-Studio,  
H-1675 Budapeŝt, pk. 87. Hungario!*

## Mecenatoj subtenas persistantojn

Tria provo kunigi estrojn de Esperanto-centroj sukcesis en la UK. Konfirmiĝis la utileco de tiaj inform-interŝanĝaj renkontiĝoj, eĉ se la sola nun decidita projekto, aperigo de simplizenta broŝuro pri la centroj, ne realiĝis pro material-manko.

Duafoje la UK enhavis Tagon de la Esperanto-Libro. Dekkvino da eldonejoj prezentis novaĵojn, el kiuj fragmentojn legis aktorino Wera Blanke. La Tago sendube meritis resti konstanta ero de la UK.

### KULTURAJ EVENTOJ/PREMIOJ

Jam dekafoje okazis la aranĝo Artaj Konfrontoj en Esperanto (ARKONES), oktobre en Poznań (Pollando). Riĉa arta kaj prelega programo kaj granda spektantaro igas tiom pli bedaŭrinda ke, pro la nunaj kondiĉoj de la lando, ARKONES eble ĉesos. Alian tradicion eventon, la zagreban Pupteatran Internacian Festivalon, ombris sed ne nuligis minacanta milito. Malgraŭ eksteraj malfacilaĵoj kaj preskaŭa foresto de esperantista publiko, persisto ne mankas ĉe la Internacia Kultura Servo, kiu planis la 25-an PIF por junio 1992. Kiel reprezentanto de PIF, la estrarano pri kulturo S. Štimec prelegis en Esperanto kadre de la 3-a Internacia Pupteatra Festivalo en Teherano.

Aparte elstaris la 7-a Festivalo de la Esperanto-Kulturo novembre en Parizo. Ducent spektantoj el 16 landoj ĝuis riĉan programon literaturan, muzikan kaj teatran, tiel ke la aranĝo fariĝis la plej sukcesa en sia historio.

Ĉar nian kulturon konstante premas manko de financaj rimedoj, bonvenas novaj fondaĵoj kaj monpremioj. En 1991 disdonis siajn unuajn premiojn de po 10 000 germanaj markoj Fondaĵo FAME el Germanio, kiuj iris al la Kultura Centro Esperantista (La Chaux-de-Fonds, Svislando) kaj s-ro Itō Kanzi (Japanio). Fondaĵo Saliko, kiu subtenas E-instruadon en landoj sen organizita movado, disdonis siajn unuajn subvenciojn, por eldoni bjiolanusan kaj mongolan E-lerneolibrojn.

La kvina Premio Degučĉi estis atribuita al la brazila edukisto, verkisto kaj aktivulo Sylla Chaves. Tiu ĉi movada "pacpremio", garantiata de Oomoto, rekonas la agadon de tiuj kiuj per Esperanto kontribuas al edukado je internaciismo kaj tutmonda konscio. La duan OSIEK-premion por nebeletra verko, 300 ekuojn, gajnis Evaldo Pauli pro sia *Mil jaroj de kristana filozofio*.

La Belartaj Konkursoj de UEA firmiĝis finance per la starigo de speciala fondaĵo. Ankaŭ en 1991 lanĉiĝis promesplena juna aŭtoro, Gonçalo Neves el Portugalio (Nova Talento), dum lia antaŭulo el 1990, Ulrich Becker, ĉi-foje konkeris la unuajn du premiojn por prozo. Kio malofte okazas: oni alĵuĝis la unuan premion por teatraĵo, al Georges Lagrange (Francio). En poezio neniu verko iĝis premiita, kio tamen estas pli hazardo ol zorgiga simptomo. En la prove lanĉita vidbenda branĉo partoprenis nur tri filmoj, tro amatoraj por unua aŭ dua premio. Mark Fettes gajnis la Premion Luigi Minnaja en la esea branĉo, kies nivelo denove estis alta, male al la senpremia kantobranĉo. Paradoxse ke nia muzika kulturo eĉ floras lastatempe, sed la muzikistoj ne sendas siajn verkojn al la Belartaj Konkursoj.

### ELDONADO

La Jubilean Kolekton de UEA riĉiĝis en 1991 la 509-paĝa *Nova Esperanta krestomatio* redaktita de William Auld. La verko vaste panoramas la evoluon de la beletra kaj fakliteratura stilo ekde Zamenhof ĝis hodiaŭ. Ĝi rikoltis tre favorajn recenzojn kaj furoro ekvendiĝis. Daŭris la prespreto de *Fundamenta krestomatio*: tiun ĉi 18-an eldonon, elirontan en aprilo 1992, zorge editoris kaj prikomentis Gaston Waringhien. Jarfine reaperis la fama infanlibro *Winnie-la-Pu* de A. A. Milne. Estis presita la tria eldono de *Metodiko de la Esperanto-instruado* de Rudolf Rakuŝa, sed ĝi surmerkatigis nur en marto 1992. UEA kontraktis kun usona uni-

versitata eldonejo pri anglalingva eldono de *Esperanto: lingvo-literaturo-movado* de Pierre Janton.

La jaro relative riĉis je novaj originalaj beletraĵoj. Du lastatemaj "steloj", Krys Ungar kaj Georgo Kamaĉo, aperigis propran volumon, resp. *Meznokto metropola* kaj *Sur la linio*. J. H. Rosbach lanĉis en sia hejmlanda UK romanon kaj novelaron, *Unumane* kaj *Silka kuseno*. Malpli rimarkigis la bele eldonita dulingva poemaro *Floroj de herbejo* de la finno R. Eriksson, dum tri krimroman(et)oj trovjis bonan eĉon ĉe aĉetantoj: *La kisa malsano* (Piron), *Urd Hadda murdita!* (Dorval) kaj *La septaga murdenigo* (Gates).

Ne mankis represoj. Fenikso kompletigis sian Baghy-oferton per *Preter la vivo* kaj *Pilgrimo*, dum Pro Esperanto rehabebligis la romanon *La vila mano* de H. J. Bulthuis kaj la rakonton *Kraljeviĉ Marko* de M. Abesgus (1896). Edidistoj represis *Mondo de travivaĵoj* de T. Sekelj kaj aperigis de li ankaŭ novan volumon, *Gambo rafiki*. Inter multaj tradukoj menciindas la 12a-jarcenta kartvela epopeo *Kavaliro en tigra felo*, la novelaro *Goŝ la ĉelisto* de la japana Miyazawa Kenzi kaj *Sveda alumeto*, novelaro de Ĉeĥov. Per tiu Sezonoj (Rusio) inaŭguris viglan eldonadon, kiu impone rezultigis la romanon *Majstro kaj Margarita* de M. Bulgakov, en la serio "Oriento-Okcidento". Ĝi jam presigis, sed ne surmerkatigis en 1991. Ĉe Unuiĝo Franca por Esperanto eliris trivoluma *Franca antologio*, kies eroj antaŭe aperis revue.

Kajto eldonis en 1991 sian duan kasedon/kompaktan diskon, la ege originalan *Procesio multkolora*. Kvan-kam k-diskoj ankoraŭ malmultas en nia merkato, tamen la eldonado de vinilaj diskoj ne plu estas komerce prudenta. Tial UEA pasintjare vendis multajn kun granda rabato.

Inter la vidbendoj la plej interesa pasintjare estis *Reveno al Finnlando* de R. Dobrzyński. Tiu frukto de pola-finna kunlaboro per Esperanto trifoje elsendiĝis ĉe la Pola Televido kaj dum la filmado akiris multan publikan atenton en Finnlando. Literatura Foiro eldonis kasedon *Kinarto kaj ni* kun fragmentoj el filmoj en kiuj li rolis Esperanto.

## Ĉu nova ILEI-teamo dudek-obligos la komencantaron?

1991 estis elektojaro en la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, kiu prizorgas la edukon kampon por UEA. En la nova teamo, nur la kasisto Bertil Andréasson (Svedio), d-ro Zhang Danchen (Ĉinio) kaj Stefan MacGill (Hungario) restis el la antaŭa estraro. Tiu lasta iĝis prezidanto, kaj prof. Ronald Glossop (Usono) vicprezidanto. Aliaj novuloj: sekretario Marija Belošević (Kroatio), Zsuzsa Barcsay (Hungario) kaj d-ro So Jin Su (Koreio). La ek-estraro kunidis lastfoje en Belgio ĉe la tiama prezidanto Edward Symoens, kies plurjaran kontribuon oni dankis en la konferenco aŭguste.

### KONFERENCOJ

La 9-a Internacia Metodika Simpozio organiziĝis en Odorheiu Secuiesc (Rumanio) kiel la unua internacia E-aranĝo en tiu reviviganta lando. Anstataŭ la kutima programo, ĝi proponis pli fundamentan kurson por instruantoj, kiujn la loka bezono urĝas. Krome eksterlandaj gvidantoj gvidis du-semajnan kurson por junaj komencantoj. Rekorde granda ekzamenseso havis 23 kandidatojn.


La jubilea 25-a konferenco pritemis “Tireso, Raŭmo kaj nun...?” Strategiajn prelegojn (Fischer, Degoul, MacGill, v.d. Horst-Kolińska) sekvis pedagogiaj (Dahlenburg, Barcsay, Glossop, Wandel) kaj lingvaj (Lu Jixin). Krom statutajn diskutojn kaj elektojn, la 65 konferencanoj ĝuis vesperon pri antaŭaj konferencoj.

La Tago de Lernejo en la UK altiris centon da partoprenantoj.

### ORGANIZADO

ILEI retenis okcenton da membroj en 1991 kaj, prepare al novaj sekcioj, nomumis reprezentantojn en Rumanio kaj Albanio. Finance ĝi atingis etan pozitivan saldon, sed ĝia kapitalo restas tre modesta (ĉ. 45 000 gld.). Fondaĵo Szerdahelyi, tre sukcese lanĉita en 1990, apenaŭ kreskis en 1991. *Internacia Pedagogia Revuo* – kies redaktadon István Ertl

trandonis al Márta Kovács – daŭre konsumas duonon de la enspezoj. Pli da honorariitoj ebligis ampleksgigon de la laboro (ĉefe pri ekzamenoj kaj eldonado) sed foruzis nur ĉ. 12% de la buĝeto.



*En Esperanto plu ĉefrolas tradiciaj instrumentoj (Reza Hejr-Hab klarigas angle, en Zhongshan, Ĉinio).*

### KURSOJ KAJ EKZAMENOJ

1991 vidis pli da sukcesintoj ol la antaŭaj du jaroj sume en la ekzameno de UEA/ILEI. 102 kandidatoj el 18 landoj sukcesis en dek sesioj en ok landoj. (Por la tuto de la tri jaroj 186, 31, 26 kaj 15 resp.) Tri sesioj en Ĉinio kaj ĉina versio de la ekzamena gvidilo emfazis ilian akcepton de la internaciaj normoj. Jarfine ekoficis nova ekzamena sekretario, Marie Hunnink (Francio).

En la UK Internacia Esperanto-Instituto okazigis Ĉe-kurson, sed ne dum la ILEI-konferenco. La instruista kurso planita por Bjalistoko nuligiĝis; la estraro zorge preparas restarigon de tiaj gravaj kursoj.

### ELDONADO

La unua kajero de la komunik-situacia lernolibro *Tendaraj tagoj* havis bonan eĥon ĉe la lernantoj (pli ol mil venditaj en julio-decembro). Sekve ĝia investo jam regajniĝis.

La ekzamena gvidilo bone vendiĝas kaj baldaŭ elĉerpigos. IEF aperigis itale verkon de E. Symoens

pri la propedeŭtika valoro de Esperanto.

Post rezigno de Hungara E-Asocio eldoni la lernejan revuon *Juna amiko*, en februaro 1992 konsentis transpreni ĝin ILEI, kvankam tio kreskigos ĝinaj elspezoj per pli ol 50%. Jarfine edukaj eldon-projektoj estis en preparo.

### INICIATOJ

ILEI partoprenis la konferencon pri naturdotitaj infanoj julie en Hago ne nur per gvido de seminarioj, sed ankaŭ per demonstro-lecionoj pri la atingoj de 8–9-jaraj infanoj el E-klaso en Budaĵs (Hungario).

Anglalingva libro pri la “esplor-kreiva vojo al lingvolernado” prezentis kiel aplikiga metodo al diversaj lingvoj. La rezultoj de la klaso de Oene Hoekstra en Schoorl (Nederlando) figuras plurloke tra ĝi.

### AGADO EKSTER ILEI

En 1991 la E-fako en la universitato Eötvös Loránd, Budapeŝto, festis sian 25-jariĝon. Ĝiaj surlokaĵ kaj internaciaj korespondaj kursoj altiris tridekon da studentoj. Tra la 25 jaroj ĝi kreis pli ol 100 diplomitojn.

### KORESPONDA SERVO MONDSKALA

KSM-on akurate funkciigis F.X. Gilbert. En 1991 ĝi ricevis 635 leterojn, precipe el Sovetio (120), Brazilo (99), Francio (81), Rumanio (37) kaj Pollando (31), kaj mem sendis 364.

### KONKLUDE

ILEI kontribuis al la strategia debato en la movado per la *Proklamo de Voss*, vaste raportita en la Esperanto-gazetaro kaj dufoje en la kroata televido. Jarfine, artikolo en IPR provis paŝi pluen, rezonante pri kiom da instru-investo estas bezonata por subteni la nunan amplekson de la E-movado. Laŭ ĝi, necese estus logi ĉiujare 200 mil personojn al komencanto-kursoj – dum dujara enketado rivelis nur ĉ. 10 000 studentojn de la lingvo tutmonde. Neevitebla konkludo: la instru-bezono superas la nunan atingon, kaj la rimedoj de ILEI tre malsufiĉas. Necesas plekti plie ne nur fortojn el la cetera movado sed ankaŭ de ekster ĝi.

## Malprofesieco bremsas komercan agemon

### ASOCIOJ

La nova Ĝenerala Regularo difinas pli specife ol antaŭe la kondiĉojn de aliĝo de fakaj asocioj al UEA. La Komitato en Vieno traktos la detalajn preskribojn bazitajn sur ĝi kaj la analizon pri la situacio de la fakaj asocioj fare de la respondeca estrarano O. Princz. Severigo montrigas necesa, ĉar multaj fakaj asocioj funkcias nur surpapere – kaj plimulto ĉiukaze malkontentige –, sed, malgraŭ tio, kontraŭ ege modesta kotizo ili rajtas ĝui servojn kiuj kostas multe al UEA. Rekoniderindas ankaŭ, en kiuj fakoj UEA havas intereson kontrakti kun aliĝinta aŭ eĉ nur kunlaboranta FA. Lige kun tiu problemaro la Estraro iniciatis ankaŭ diskuton, kiel pli juste interrilatiĝi la devojn kaj rajtojn inter UEA kaj la FA-oj. Raciigo ĉi-riilate povus konduki al pli efika, prudenta kaj sistema agado flanke de FA-oj.

La nombro de aliĝintaj fakaj asocioj restis sen ŝanĝo (t.e. 6), dum tiu de kunlaborantaj kreskis de 33 al 34 per la akcepto de kunlabora kontrakto kun Asocio por Studado Internacia de Spiritaj kaj Teologiaj Instruoj: ASISTI estas relative malgranda, sed certe tre aktiva asocio, kun regula kaj bone redaktata bulteno *Asistilo*. La Esperanta Jura Asocio komencas rekonordigi la juran agadon, dum TEJA (jurnalisto) reviviĝas sub la nova prezidanto S. Maul.

### FAKA KAJ SCIENCA APLIKADO

Akademio Internacia de la Sciencoj subskribis pliajn kontraktojn pri kunlaboro. Aparte gravas la kontrakto kun la Karola Universitato de Prago, kies pedagogia fakultato disponigos lokon por filio de AIS. Surbaze de la kontrakto ankaŭ en aliaj universitatoj kaj aliternejoj de Ĉeĥoslovakio povas fondiĝi informoj pri AIS. Kontrakto kun la Silezia Universitato en la sama lando jam rezultigis apilan seminarion pri merkata ekonomio en Opava kun

60 partoprenantoj. En marto la ĉefa motoro de AIS, prof. H. Frank, gvidis per Esperanto kurson pri kibernetiko por 46 universitatajn en Rosario (Argentino). Inter diversaj AIS-sesioj envicigis ankaŭ la unua rusa, okazinta fine de decembro 1991 kaj komence de januaro 1992 en Moskvo kaj Sankt-Peterburgo, kies 180 partoprenantoj ne povis ne sperti unu el la ĉefaj ankoraŭ ne venkitaj problemoj de AIS, la hastan improvizadon.

Laŭ iniciato de Scienc-Teknika E-Asocio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj la Juna Ekonomia Ĉambro de Oostende (Belgio) okazigis en oktobro unusemajnan ekspozicion de 120 ĉinaj entreprenoj, serĉantaj kontaktojn kun eŭropaj komercistoj. Esperanto havis ŝlosilan rolon en la prepara korespondado kaj intertraktoj. Aparte multaj provoj apliki Esperanton por komercaj rilatoj okazis en eks-sovetiaj landoj, sed ilian sukceson bremsis, krom la “komercanteco” de la komercemuloj, la fakto ke por okcidentanoj Esperanto plu estas ŝatokopo pli ol rimedo por materiaj celoj. Inter la multaj provoj ni menciuj tiun de la Tutunia Institut’ de Administrado en Ukrainio por manaĝistoj, kiu en sia sino starigis E-centron. Utilan rolon kiel komercperanto plenumas la bulteno *La merkato* de la Internacia Komercakaj Ekonomia Fakgrupo kaj la revuo *Monda merkato*, sed

fondiĝis ankaŭ aliaj tiucelaj informiloj, probable efemeraj.

Kiel notite aliloke, Esperantotur frontas profundan krizon. Malgraŭ tio ĝi ekrealigis en 1991 la unuan turisman “studumon”, kies celo estas dum naŭ monatoj trejni ŝtate agnoskitajn turismajn fakulojn. Varbado de eksterlandaj studentoj ne sukcesis, tiel ke la tuta kursanaro venis el Pollando.

### ELDONADO

La faka literaturo akiris en 1991 apenaŭ dekon da novaj titoloj. Menciindaj estas la 8-a volumo de *Geologio Internacia*, kiu eliris en Pekino, kaj la unua volumo de AIS-kursotekstoj, *Aktoj de SUS*. Inter prisociaj verkoj elstaris *Manifesto de la Komunista Partio* (tr. D. Blanke) kaj *Entreprenistaj strategioj* de W. Bormann. En traduko de I. Ertl aperis la filozofia klasikajo *Pri feliĉa vivado* de Seneko, kaj R. Hirsch publikigis zorge kompilitan, 416-paĝan *Katalogo de la Esperanta filatelio*.

### TERMINOLOGIA

#### ESPERANTO-CENTRO

La oficejo de TEC en Zagrebo ĉesis funkcii, sed, dank’ al la juna ĉeĥa terminologo Jan Pospšil, kiu pretis transpreni la ĉiutagan gvidadon de TEC, nova oficejo de TEC povis esti malfermata en 1992 en Ĉeĥoslovakio. Lige kun tiu transpreno fondiĝis memstara, oficiale registrita ĉeĥa filio de TEC. Kelkaj terminaroj estis jam en sufiĉe progresinta stato por apero en 1992.

En oktobro d-ro Edmund Brent reprezentis TEC en la deka kunveno de la ISO-komisiono “Terminologio (principoj kaj kunordigo)” en Hull (Kanado).

### Esploro kaj dokumentado:

## Prestiĝaj eldonaĵoj kaj konferenco

### CENTRO DE ESPLORO KAJ DOKUMENTADO

La revuo de CED, *Language Problems and Language Planning*, aperis dum 1991 tre akurate, en tri numeroj, ĉe sia nova eldonejo Benjamins en Amsterdamo. Artikoloj en

la revuo, kiu ĝuas altan prestiĝon inter lingvistoj, aperas en diversaj lingvoj, ĉiam kun Esperanta resumo, i.a. pri lingvoplanadaj kaj-politikaj demandoj de Israelo ĝis Namibio, Katalunio ĝis Novzelando. La revuo



estas abonebla ĉe UEA. Ĝin redaktas teamo konsistanta el d-koroj Probal Daŝgupto, Klaus Schubert kaj Humphrey Tonkin.

Raporto pri la 14-a Esperantologia Konferenco aperis en la septembra *Esperanto*. La nova kunordiganto de la konferenco, d-ro Detlev Blanke, finis la preparojn por novtipa strukturo, aplikota jam en 1992 (vd. la revuon, 1992, p.44). Blanke ankaŭ transprenis, ekde 1992, redaktadon de la reaperonta novaĵletero de CED, *Informilo por Interlingvistoj*.

La konferenco kiun CED organizas ĉiujare en Novjorko kunlabore kun la Traduka Servo de UN traktis ĉi-foje la temon "Lingvo kaj internacia edukado: Kiajn prioritatojn?" En elstare bonaj referaĵoj kaj multa vigla diskutado la rolo de Esperanto en la lingvoinstruado ricevis abundan, ĝenerale favoran, atenton. Enkonduke prelegis la konata lingvisto Joshua Fishman.

En 1989 CED inaŭguris novan serion kune kun la usona eldonejo University Press of America. Unu volumo, *Language in religion*, aperis ĝis nun (kun Esperantaj resumoj). Tri pliaj volumoj verŝajne aperos en 1992: kolekto de artikoloj pri Esperanto kaj interlingvistiko aperintaj en *LPLP* (sub redakto de H. Tonkin), referaĵoj prezentitaj dum la ĉiujara seminario pri esperantologio en la konferenco de Asocio pri Modernaj Lingvoj (MLA) (red. Ian Richmond) kaj referaĵoj el la decembra konferenco (red. Kurt Mueller). Ili estos aĉeteblaj ĉe UEA.

En la lasta eldono de la renoma bibliografio de MLA, por 1990, aperis 226 eroj pri Esperanto kaj interlingvistiko, en ĉapitro redaktita de H. Tonkin, Jane Edwards kaj W.A. Verloren van Themaat.

La E-fako de la Universitato Eötvös Loránd en Budapeŝto okazigis en septembro la trian sesion de sia trijara internacia koresponda kurso pri interlingvistiko.

Merititan rekonon ricevis de la Fondaĵo FAME Itô Kanzi (Ludovikito), kiu dum du jardekoj kompilis kaj eldonis pli ol kvardekvoluman Plenan Verkaron de Zamenhof.

## BIBLIOTEKO HECTOR HODLER

Plurfoje kunsidis fakuloj pri la ordigado kaj moderna katalogado de la biblioteko. La Estraro de UEA decidis starigi fondaĵon por la necesaj ekipaĵoj kaj la dungo de portempa laboranto (vd. la revuon, 1991, p. 225). Hungaraj eldonis katalogon de pli ol 5000 Esperanto-libroj el la kolekto de Károly Fajsi en Budapeŝto.

## ESPLORADO

En 1991 eldoniĝis gravaj naci-lingvaj kontribuoj, ekz. du ruslingvaj verkoj: kronologia prezento de 912 planlingvoj fare de A. D. Duliĉenko, kaj la artikol-kolekto *Problemo de*

*internacia helpa lingvo* redaktita de M.I. Isaev; krome aro da artikoloj en la germana lingvistika fakrevuo *ZPSK*, inter kiuj elstaras ampleksa intervjuo kun André Martinet. *Lingvistikaj aspektoj de Esperanto* de John Wells tradukiĝis en la korean lingvon. Benoît Philippe disertaciis ĉe la Universitato de Stanco (Germanio) pri lingvoŝanĝigo en Esperanto. Ĝustatempe por la centjariĝo de Ernest Drezen (1892-1937) eliris en Moskvo amplekse printotita reeldono de lia ĉefverko *Historio de la mondlingvo*, en prizorgo de S. N. Kuznecov. La eminente kompetenta *Etimologia vortaro de Esperanto* de E. Vilborg riĉiĝis per la volumo E-J.

## Fondumo Zamenhof:

### Post senmoveco, nova instigo

La ambicia projekto pri Centro Zamenhof en Bjalistoko apenaŭ moviĝis en 1991. Klopodoj allogi entreprenistojn por investi en Bjalistoko ne portis rezulton.

En 1992, tamen, la projekto ricevis fortan antaŭenpuŝon. La urbaj aŭtoritatoj donacis al la Fondumo la placon sur kiu devus situi la Centro. Sur ĝi troviĝas iama talmuda lernejo, kiun la Fondumo, laŭ la kondiĉoj de

la donaco, devos renovigi. Kvankam restas la financa problemo, la projekto nun estas je unu paŝo pli konkreta.

La estraron de la Fondumo plu prezidis H. Tonkin, apud kiu ankaŭ R. Dobrzyński reprezentis UEA. Jarosław Parzyszek plenumis la taskojn de direktoro. Li nun aktive elpaŝas por varbi monsubtenon.

## Finaj vortoj:

### Recenzu nian filmon

Kiu tralegis la supran raporton en unu fojo, kvazaŭ spektis dokumentan filmon pri unu jaro en la vivo de UEA kaj de la movado. Multaj bildoj meritas esti haltigitaj por pli longa kaj funda prijuĝo, des pli ĉar pri multaj problemoj la Estraro ne povis klare difini sian politikon. Sed aliaj bildoj indas kontemplan pro sia optimismiga enhavo, kiel ekz. la nova elano de la junulara movado aŭ la konkero de novaj landoj – ĝuste en la tago kiam oni tajpis tiujn ĉi liniojn, nova lando

kun sia unua membro aldoniĝis al la mapo de UEA.

Se vi partoprenos en la UK en Vieno, venu al la Ĝenerala Kunsido de UEA, kie vi povos aliĝi al la diskuto pri tiu ĉi raporto. Se vi ne kongrosos, skribu al la Centra Oficejo pri ĉio kion la raporto pensigis al vi. Ĉies opinioj ricevos atenton, ĉu per aperigo en tiu ĉi revuo ĉu per transdono al la koncerna estrarano. Tiel ankaŭ vi kontribuos al la pretigo de la Laborplano de UEA por la periodo 1993-1996.

Financaj aldonaĵoj al la Raporto:

(Ĉiuj sumoj estas en nederlandaj guldenoj.)

## Spezokonto de Universala Esperanto-Asocio por la jaro 1991

KOSTOJ	Buĝeto	Rezulto
Salajroj .....	421 000	415 687,13
Socia asekuro .....	83 300	83 053,87
Suplementoj .....	17 200	16 988,82
Kafo, teo, lakto .....	1 500	1 449,42
<b>Salajroj ktp, nete .....</b>	<b>523 000</b>	<b>517 179,24</b>
Afranko, nete .....	20 000	8 206,37
Telekomunikiloj .....	8 000	6 928,03
Presajoj .....	10 000	8 689,50
Materialoj .....	8 000	5 535,97
Riparo kaj prizorgo de maŝinoj .....	16 000	16 044,31
Revizoro .....	2 000	2 000,00
Administrataj kostoj ĝeneralaj .....	1 000	1 063,65
Fotokopiado .....	3 500	4 416,00
Fotokopiado (vendoj/kompensoj) .....	-1 500	-3 644,39
<b>Centra Oficejo, nete .....</b>	<b>67 000</b>	<b>49 239,44</b>
Gasoj, elektro .....	10 000	11 297,04
Akvo .....	750	527,36
Riparo de la Domo .....	1 500	235,46
Purigado .....	5 500	7 587,06
Asekuro .....	3 500	6 114,24
Impostoj je la Domo .....	2 000	2 553,52
Luo ricevita .....	-250	-2 002,10
<b>Oficeja Domo, nete .....</b>	<b>23 000</b>	<b>26 312,58</b>
Preskostoj de <i>Esperanto</i> .....	45 000	44 125,00
Afranko/ekspedo .....	73 000	71 351,43
Grafiko .....	25 000	25 002,60
Kovertoj .....	4 500	6 930,45
Anoncoj .....	-11 500	-8 138,30
<b>Esperanto, nete .....</b>	<b>136 000</b>	<b>139 271,18</b>
Preskostoj de la Jarlibro .....	28 000	28 375,73
Afranko/ekspedo .....	20 000	24 107,68
Grafiko .....	8 000	9 081,75
Kovertoj .....	2 500	2 359,70
Anoncoj .....	-11 500	-11 713,00
<b>Jarlibro, nete .....</b>	<b>47 000</b>	<b>52 211,86</b>
Preskostoj de <i>Kontakto</i> .....	5 325	6 550,80
Sendokostoj .....	7 125	7 858,19
Ekspedlaboro & kovertoj .....	3 250	3 205,81
Grafiko .....	7 100	8 820,78
Redakto .....	2 500	3 000,00
Anoncoj .....	-300	-197,00
<b>Kontakto, nete .....</b>	<b>25 000</b>	<b>29 238,58</b>

Vojaĝkostoj estraraj .....	17 000	12 384,07
Vojaĝkostoj komisionaj ktp .....	4 000	3 251,69
Vojaĝkostoj oficejaj .....	4 000	5 574,99
Vojaĝkostoj kongresaj .....	5 000	9 317,19
Reprezentaj kostoj .....	4 000	4 399,66
<b>Vojaĝkostoj ktp .....</b>	<b>34 000</b>	<b>34 927,60</b>

Korespondado, estraro .....	4 000	2 212,43
Korespondado, komisiitoj ktp .....	2 000	793,84
<b>Korespondokostoj entute .....</b>	<b>6 000</b>	<b>3 006,27</b>

Bankokostoj .....	2 000	1 531,76
Kurzdiferencoj .....	500	-61,23
Antaŭa jaro .....	0	2 447,59
Diversaj kostoj .....	500	110,91
<b>Ĝeneralaj kostoj .....</b>	<b>3 000</b>	<b>4 029,03</b>

Amortizo de la Domo .....	7 560	3 212,12
Amortizo de la aparatoj/mebloj .....	8 650	9 279,28
Amortizo de la telefonsistemo .....	1 515	1 513,58
Amortizo de la komputilo .....	13 775	13 348,57
Amortizo de la programaro .....	11 500	9 443,74
<b>Amortizo entute .....</b>	<b>43 000</b>	<b>36 797,29</b>

<b>Sumo de la kostoj .....</b>	<b>907 000</b>	<b>892 213,07</b>
--------------------------------	----------------	-------------------

RIMEDOJ (enspezoj)	Buĝeto	Rezulto
Kotizoj Membroj kun Gvidlibro .....	6 300	5 510,72
Kotizoj Membroj kun jarlibro .....	35 500	40 691,50
Kotizoj Membro-abonantoj .....	254 900	231 862,83
Kotizoj Membroj kun jarlibro (junaj) .....	8 300	9 204,57
Kotizoj Membro-abonantoj (junaj) ..	20 000	20 939,96
Makleraĵo de perantoj .....	—	35 860,06
Kotizoj de individuaj membroj .....	325 000	344 069,64
Aligitaj membroj .....	22 500	18 979,61
Aligitaj membroj junaj .....	7 000	5 066,00
Simplaj abonoj <i>Esperanto</i> .....	10 000	7 722,98
Kolektivaj abonoj <i>Esperanto</i> .....	8 000	5 781,50
Abonoj kaj vendoj <i>Kontakto</i> .....	9 000	6 747,91
Kolektivaj abonoj <i>Kontakto</i> .....	5 500	4 333,81
Societo Zamenhof .....	25 700	20 555,67
Kotizoj de fakaj organizoj .....	3 800	4 004,00
minus makleraĵo al perantoj .....	—	-35 860,06
minus sumo al TEJO .....	-7 575	-6 928,14
<b>Kotizoj entute .....</b>	<b>408 925</b>	<b>374 472,92</b>

Vendo de la Libroservo .....	330 000	270 504,08
Kosto de varoj venditaj .....	-240 000	-189 465,73
Libroservo, malnete .....	90 000	81 038,35
minus katalogokostoj .....	-16 000	-10 000,00
Abonfako .....	8 500	7 396,22
<b>Libroservo, nete .....</b>	<b>82 500</b>	<b>78 434,57</b>

Vendo de la Eldona Fako .....	93 000	55 625,10
Aldonoj (novaj libroj) .....	-50 000	-89 576,66
Ŝanĝo stokvalora .....	-12 000	+51 667,67
Tantiemoj .....	-6 200	-2 785,02
<b>Eldona Fako, nete .....</b>	<b>24 800</b>	<b>14 931,09</b>

Grafikaj servoj CO .....	45 000	56 107,90
Administrado, Inst. Hodler .....	500	500,00

Aliaj servoj CO .....	5 000	18 636,76
Servoj entute .....	50 500	75 244,66
Kompenso – programaro .....	10 000	1 680,00
Turismo de Kapitalo Dumvivaj Membroj .....	30 500	34 865,08
de Propaganda Konto pro informado ....	25 000	25 000,00
<b>Kompensoj entute .....</b>	<b>65 500</b>	<b>61 545,08</b>
Kotizoprocenĵo 75a UK .....	100 000	106 045,68
Turismo .....	10 000	18 487,99
Rento, nete .....	60 000	61 765,19
Donacoj al la Generala Kaso .....	15 000	11 755,59
Aliaj enspezoj .....	3 000	1 520,36
<b>Diversaj enspezoj entute .....</b>	<b>188 000</b>	<b>199 574,81</b>
<b>Sumo de la rimedoj .....</b>	<b>820 225</b>	<b>804 203,13</b>
<b>Negativa saldo .....</b>	<b>86 775</b>	<b>88 009,94</b>
<b>Sumo de la kostoj .....</b>	<b>907 000</b>	<b>892 213,07</b>

Kasoj diversaj .....	8 340,73	6 229,62
<b>Kasoj/bankokontoj entute .....</b>	<b>1 000 092,39</b>	<b>1 242 821,92</b>
<b>Sumo de la kapitaloj .....</b>	<b>3 523 994,06</b>	<b>3 667 936,62</b>

#### PASIVOJ

Kapitalo .....	478 658,91	340 345,32
Saldo de spezkonto .....	-30 748,13	-88 009,94
Kapitalo Azio .....	470 000,00	480 000,00
<b>Kapitalo, Generala &amp; Azio .....</b>	<b>917 910,78</b>	<b>732 335,38</b>
<b>Kapitalo Dumvivaj Membroj .....</b>	<b>374 968,97</b>	<b>421 841,87</b>
Rezervo, debitoraro .....	37 052,20	28 481,38
Kongresa Rezervo .....	86 447,88	54 989,16
Rezervo IJK .....	17 391,32	25 221,73
Rezervo, emeritaj ofiĉistoj .....	47 750,00	49 600,00
Aliaj sumoj rezervitaj .....	37 791,24	37 178,40
<b>Rezervoj entute .....</b>	<b>226 432,64</b>	<b>195 470,67</b>

Belarta Fondajo .....	—	99 236,42
Fondajo Afriko .....	—	4 105,34
Fondajo Ameriko .....	—	12 108,32
Fondajo Azio .....	34 043,22	37 402,47
Fondajo Biblioteko .....	—	15 743,01
Fondajo Canuto .....	3 489,33	7 858,78
Fondajo Enciklopedio .....	2 009,21	—
Fondajo Grabowski .....	48 096,03	49 784,94
Fondajo Junularo .....	20 046,53	35 647,76
Fondajo Kantoj .....	14 254,19	14 899,10
Fonduso Kipro .....	3 500,00	—
Fondajo Saliko .....	58 316,32	61 057,75
Fondajo Scienco & Tekniko .....	2 095,34	—
Fondajo Universala Ekspozicio ...	5 695,02	—
Fondajo Wüster .....	15 617,36	17 525,61
Propaganda Konto .....	13 762,27	17 970,42
Triamonda Kongresa Fondajo .....	50 335,61	57 749,09
Volontula Fondajo .....	35 173,54	69 705,26
<b>Fondajoj entute .....</b>	<b>306 433,97</b>	<b>500 794,27</b>

Antaŭricevitaj rimedoj .....	89 800,23	119 842,29
Pagotaj kostoj .....	89 955,69	113 619,41
Pendantaj spezoj .....	8 382,28	9 264,71
Kreditoroj .....	865 142,56	920 197,94
Deponoj de membroj .....	644 966,94	654 570,08
<b>Kreditoroj k.s. entute .....</b>	<b>1 698 247,70</b>	<b>1 817 494,43</b>

<b>Sumo de la pasivoj .....</b>	<b>3 523 994,06</b>	<b>3 667 936,62</b>
---------------------------------	---------------------	---------------------

## Bilanco de Universala Esperanto-Asocio je la 31-a de decembro 1991

(por komparo aperas ankaŭ la stato fine de 1990)

AKTIVOJ	1990	1991
Domo, Roterdamo .....	273 885,13	318 000,00
Renovigo/pligrandigo .....	160 685,48	0,00
Tereno Aspremont .....	1,00	1,00
<b>Nemoveblaĵoj .....</b>	<b>434 571,61</b>	<b>318 001,00</b>
Ekipaĵoj & mebloj .....	51 121,25	45 494,47
Komputilaj aparatoj .....	62 190,91	53 397,25
Programaro .....	44 582,77	37 774,94
Telefonsistemo .....	15 135,79	13 622,21
en Novjorko .....	1,00	1,00
<b>Maŝinaro ktp .....</b>	<b>173 031,72</b>	<b>150 289,87</b>
<b>Blokitaj monrimedoj .....</b>	<b>40 313,41</b>	<b>12 938,18</b>
Akcioj .....	645 484,40	712 659,01
Obligacioj .....	346 660,00	386 850,00
<b>Valorpaperoj entute .....</b>	<b>992 144,40</b>	<b>1 099 509,01</b>
Stokoj libroservaj .....	196 292,85	189 197,45
Stokoj, Eldona Fako .....	362 779,20	414 446,87
Presajoj, materialoj k.s. ....	15 482,00	27 503,00
<b>Provizoj entute .....</b>	<b>574 554,05</b>	<b>631 147,32</b>
Ricevotaj rimedoj .....	109 287,89	42 043,01
Antaŭpagitaj kostoj .....	20 119,93	34 769,65
Debitoroj .....	101 535,75	136 415,89
Instituto Hodler '68 .....	78 342,91	0,00
<b>Debitoroj ktp entute .....</b>	<b>309 286,48</b>	<b>213 228,55</b>
Ŝparkontoj kaj deponoj .....	904 306,47	1 101 046,77
Kurantaj bankokontoj .....	87 445,19	135 546,30

## Evoluo de fondaĵoj de UEA dum 1991

Belarta Fondajo jarkomence .....	0
Komenca kapitalo .....	93 163
Donacoj .....	7 000
Elspetoj .....	-1 754
Rento .....	827
Jarfine .....	99 236

Fondaĵo Afriko jarkomence .....	0	Volontula Fondaĵo jarkomence .....	35 174
Donacoj .....	38 704	Enspezoj .....	40 760
Rento .....	827	Elspezoj .....	-6 229
Elspezoj .....	-35 426	Jarfine .....	69 705
Jarfine .....	4 105		
Fondaĵo Ameriko jarkomence .....	0		
Donacoj .....	12 818		
Elspezoj .....	-710		
Jarfine .....	12 108		
Fondaĵo Azio jarkomence .....	34 043		
Donacoj .....	1 424	Rezervo Debitora jarkomence .....	37 052
Rento, Kapitalo Azio .....	41 774	Deskriboj, ĝustigo .....	-8 571
Al Kapitalo Azio .....	-10 000	Jarfine .....	28 481
Elspezoj, nete .....	-29 839		
Jarfine .....	37 402	Kongresa Rezervo jarkomence .....	86 448
Fondaĵo Biblioteko jarkomence .....	0	74-a UK .....	-336
Donacoj .....	15 743	75-a UK .....	-40 397
Jarfine .....	15 743	76-a UK .....	9 274
Fondaĵo Canuto jarkomence .....	3 489	Jarfine .....	54 989
Donacoj .....	10 206	Rezervo IJK jarkomence .....	17 391
Kotizoj pagitaj .....	-13 536	45-a IJK .....	-210
Subvencio el Propaganda konto .....	7 700	46-a IJK .....	8 041
Jarfine .....	7 859	Jarfine .....	25 222
Fondaĵo Grabowski jarkomence .....	US\$28 480	Rezervo por emeritaj oficistoj jarkomence .....	47 750
Donacoj ricevitaj .....	US\$648	Rento .....	2 350
Saldo .....	US\$29 128	Elspezoj .....	-500
Fondaĵo Junularo jarkomence .....	20 047	Jarfine .....	49 600
Enspezoj [inkluzive de Pasporta Servo] .....	53 765		
Elspezoj [inkluzive de Pasporta Servo] .....	-38 165		
Jarfine .....	35 647		
Fondaĵo Kantoj jarkomence .....	14 254		
Rento .....	697		
Premio kaj kostoj .....	-52		
Jarfine .....	14 899		
Fondaĵo Saliko jarkomence .....	58 316		
Rento .....	2 965		
Elspezoj .....	-223		
Jarfine .....	61 058		
Fondaĵo Wüster jarkomence .....	15 617		
Enciklopedio, Scienco & Tekniko, Universala			
Ekspozicio .....	9 870		
Enspezoj .....	2 300		
Elspezoj .....	-10 261		
Jarfine .....	17 526		
Propaganda Konto jarkomence .....	13 762		
Enspezoj .....	41 787		
Elspezoj .....	-37 579		
Jarfine .....	17 970		
Triamonda Kongresa Fondaĵo jarkomence .....	50 336		
Rento .....	2 655		
Aliaj enspezoj .....	6 744		
Elspezoj .....	-1 986		
Jarfine .....	57 749		

## Evoluo de rezervoj de UEA dum 1991

Rezervo Debitora jarkomence .....	37 052
Deskriboj, ĝustigo .....	-8 571
Jarfine .....	28 481
Kongresa Rezervo jarkomence .....	86 448
74-a UK .....	-336
75-a UK .....	-40 397
76-a UK .....	9 274
Jarfine .....	54 989
Rezervo IJK jarkomence .....	17 391
45-a IJK .....	-210
46-a IJK .....	8 041
Jarfine .....	25 222
Rezervo por emeritaj oficistoj jarkomence .....	47 750
Rento .....	2 350
Elspezoj .....	-500
Jarfine .....	49 600

## Raporto de la Komitataj Revizoroj pri la Asocia jaro 1991

Ni, Revizoroj de UEA, profesie laboras pri librotenado kaj estas tial alkutimiĝintaj al la normoj de komercista librotenado. Ni konstatis ke la kont-laboroj de UEA konsideras ankaŭ movadecajn aspektojn.

Ni enprofundiĝis en la financojn de UEA de 1991, esploris kontojn, prijuĝis la tuton kaj priparolis ĉion kun la koncernataj respondeculoj de la Centra Oficejo.

Post tiu ampleksa kontrolado, ni proponas al la Komitato la senŝarĝigon koncerne la financajn aferojn de la Asocio.

Werner Bormann

Roterdamo, 1992 05 24

Bruĉjo Kasini

# Buĝetpropono de Universala Esperanto-Asocio por la jaro 1993

## KOSTOJ

Salajroj .....	435 000
Socia asekuro .....	87 000
Suplementoj liberaj je imposto .....	18 000
Kafo ktp .....	1 500
<b>Oficistaro .....</b>	<b>541 500</b>

Afranko, nete .....	11 000
Telekomunikiloj .....	7 500
Presajoj .....	9 000
Materialoj .....	8 000
Riparo kaj prizorgo de maŝinoj .....	16 500
Revizoro .....	2 000
Administrataj kostoj ĝenerale .....	1 000
Fotokopiado .....	1 000
<b>Centra Oficejo, nete .....</b>	<b>56 000</b>

Gasoj, elektro, akvo .....	11 000
Riparo de la Domo, purigo k.s. ....	10 000
Impostoj je la Domo, asekuro k.s. ....	8 750
Luoj ricevblaj .....	-250
<b>Oficeja Domo, nete .....</b>	<b>29 500</b>

Preskostoj de <i>Esperanto</i> .....	44 500
Afranko/ekspedo .....	60 000
Grafiko .....	25 000
Kovertoj .....	7 000
Anoncoj .....	-14 000
<b>Esperanto, nete .....</b>	<b>122 500</b>

Preskostoj de la Jarlibro .....	26 500
Afranko/ekspedo .....	20 000
Grafiko .....	7 000
Kovertoj .....	2 500
Anoncoj .....	-13 000
<b>Jarlibro, nete .....</b>	<b>43 000</b>

Preskostoj de <i>Kontakto</i> .....	11 500
Afranko/transporto .....	8 500
Ekspedlaboro & kovertoj .....	3 500
Grafiko .....	8 500
Redakto .....	3 000
Anoncoj .....	-500
<b>Kontakto, nete .....</b>	<b>34 500</b>

Vojaĝkostoj Estraro .....	16 000
Vojaĝkostoj komisiitoj ktp .....	4 000
Vojaĝkostoj oficejaj .....	6 000
Vojaĝkostoj kongresaj .....	10 000
Reprezentaj kostoj .....	4 500
<b>Vojaĝ- kaj restadkostoj k.s. ....</b>	<b>40 500</b>

Korespondokostoj Estraro ktp. ....	6 000
Bankokostoj .....	2 000
Aliaj .....	1 000
<b>Diversaj kostoj .....</b>	<b>9 000</b>

Amortizo de la Domo .....	3 150
Aparatoj kaj mebloj .....	6 275
Telefonsistemo .....	1 225
Komputilo .....	18 500
Programoj .....	6 050
<b>Amortizo entute .....</b>	<b>35 200</b>

**Sumo de la kostoj .....** **911 700**

## RIMEDOJ

Kotizoj MG (Membro kun Gvidlibro) .....	6 000
Kotizoj MJ (Membro kun Jarlibro) .....	44 500
Kotizoj MA (Membro-Abonanto) .....	258 550
Kotizoj MJ-K (kun Kontakto) .....	10 250
Kotizoj MA-K (kun Kontakto) .....	23 250
Aligitaj membroj de UEA .....	20 000
Junaj aligitaj membroj .....	5 500
Simplaj abonoj, <i>Esperanto</i> .....	8 500
Kolektivaj abonoj, <i>Esperanto</i> .....	3 000
Abonoj kaj vendoj, <i>Kontakto</i> .....	7 000
Kolektivaj abonoj, <i>Kontakto</i> .....	4 500
Societo Zamenhof .....	25 000
Kotizoj de fakaj organizoj .....	4 575
al TEJO .....	-7 625
<b>Kotizoj kaj abonoj .....</b>	<b>413 000</b>

Libroservo, malneta gajno .....	93 000
Katalogaj kostoj .....	-10 000
Abonfako .....	7 500
<b>Libroservo, nete .....</b>	<b>90 500</b>
Eldona Fako, malneta gajno .....	21 000
Tantiemoj .....	-2 500
<b>Eldona Fako, nete .....</b>	<b>18 500</b>

Grafikaj servoj de CO .....	55 000
Diversaj servoj de CO .....	15 500
Kompenso, programado .....	5 000
De Kapitalo Dumvivaj Membroj .....	34 500
Kompensoj, informado .....	25 000
<b>Servoj kaj kompensoj .....</b>	<b>135 000</b>

Kotizoprocantaĵo 77a UK .....	120 000
Turismo .....	20 000
Donacoj al la Ĝenerala Kaso .....	15 000
Rento, nete .....	50 000
Aliaj enspezoj .....	2 500
<b>Diversaj enspezoj .....</b>	<b>207 500</b>

<b>Sumo de la rimedoj .....</b>	<b>864 500</b>
<b>Deficito .....</b>	<b>47 200</b>
<b>Sumo de la kostoj .....</b>	<b>911 700</b>

*Fino de la Estrara Raporto  
1991*

# Esperanto en radio



Per nov-tipa tabelo de elsendo-horoj prezentigas la nova redaktoro de tiu ĉi rubriko: s-ro Josef Lechermeier, Erchanstr. 19, D-W-8070 Ingolstadt-Irgertsheim, Germanio (tel. +49-08424-658), kiu atendas ĉiajn concernajn sciigojn. (Se Vi mem ŝatus informiĝi pri io, laŭeble almetu intermancan respondokuponon.) La elsend-horoj indikiĝas laŭ Universala Tempo (UTC), antaŭe nomita Grenviĉa Meza Tempo (GMT). Kiam Vi transkalkulas horon por Via propra horzono, atentu eventualan diferencon de somera kaj vintra tempoj en Via lando. Ni ne havas spacon por informi pri la programoj de nur loko aŭ regione aŭskultleblaj elsendoj. Tamen, jen la adresoj de kelkaj el ili: Radio Esperanto, 145 rue Amelot, F-75011 Paris (Francio); Esperanto, H-1800, Budapeŝto (Hungario); Radio Radicale, Via Principe Amedeo 2, I-00185 Roma (Italio).

## Radioelsendoj en Esperanto Kompleta listo laŭ la stato en majo 1992

## Korespondadreso kaj ĝeneralaj informoj

Tagoj	Tempo (UTC)	Stacio	Ĉefa celregiono, frekvencoj (kHz)
ĉiutage	03.30-04.00	R. Banderantes (Brazilo)	?; 11925
dimanĉe	04.05-04.30	R. Aŭstrio	Eŭropo: 6155 13730 Proksima Oriento: 15410
ĵaŭde	04.40-04.54*	Vatikano	Eŭropo: 1611 (mezondo); 7365 9755
lastsabate monate	07.50-08.00	Litova Radio	Eŭropo: 9710
dimanĉe	08.00-08.30	R. Havano	Nord-Ameriko/Pacifiko: 11760
dimanĉe	08.20-08.30*	R. Tallinn	Nord-Eŭropo: 1035 (mezondo); 5925
ĉiutage	11.00-11.25	R. Pekino	Orienta Azio: 6955 9480
ĉiutage	13.00-13.25	R. Pekino	Sud-orienta Azio: 11650 11840
dimanĉe	13.05-13.30	R. Aŭstrio	Eŭropo: 6155 13730 Azio: 15450 17730
ĉiutage	13.30-13.55	Pola R.	Eŭropo: 1503 (mezondo); 6095 6135 7145 7285 9525
dimanĉe	15.00-15.30	R. Havano	Ameriko/Karibio: 6180 9350 11760 15230
dimanĉe	17.30-18.00	R. Havano	Afriko/Mediterraneo: 17705 17770
dimanĉe	19.20-19.29*	Vatikano	Eŭropo: 526 1530; 6245 7250 Proksima Oriento: 11740
sabate	20.00-20.20	RAI, Romo	Eŭropo: 7275 9710 11800
ĉiutage	20.00-20.25	R. Pekino	Eŭropo: 7470 9965 15345
ĵaŭde	20.15-20.30*	R. Tallinn	Norda Eŭropo: 1035 (m); 5925 9560
ĉiutage	20.30-20.55	Pola R.	Eŭropo: 1503 6095 6135 7145 7285
dimanĉe	21.00-21.30	R. Havano	Eŭropo/Mediterraneo: 17770
ĉiutage	22.30-22.55	R. Pekino	Sud-Ameriko: 9480 11515
dimanĉe	23.30-24.00	R. Havano	Ameriko: 9550 11760 13700

\*Tiu elsendo okazos ekde 1992-09-27 unu UTC-horon pli malfrue, tiel ke la horo por la mezeŭropa horzono restos la sama.

**Radioelsendoj en Esperanto** okazas ĉefe sur: mezaj ondoj (sur la skalo de la ricevilo "MW" aŭ "OM"); mallongaj ondoj ("KW", "SW" aŭ "OC") kaj parte ankaŭ sur mallongegaj ondoj (FM).

Koncerne mezajn kaj mallongajn ondojn la *frekvenco* kutime estas mezurata kaj indikata laŭ kilohercoj (kHz) – ĉe FM laŭ megahercoj – kaj la *ondolongo* laŭ metroj (m). Sur la skalo de la ricevilo oni normale trovas ĉe "mallongaj ondoj" kaj "FM" MHz-nombrojn (1 MHz = 1000 kHz).

Depende de la speco kaj tipo de via radio-ricevilo, vi povas ricevi per ĝi diversajn ondosekciojn. Preskaŭ ĉiuj riceviloj havas mallongegajn ondojn (FM), mezajn kaj longajn ondojn. (Cetero, sur longaj ondoj ne okazas Esperanto-elsendoj!) Krome, per multaj aparatoj oni povas ricevi ankaŭ unu aŭ plurajn radiobendojn (t.e. ondosekciojn fiksitajn de la Internacia Telekomunika Unio por radiostacioj) de la mallongaj ondoj. Do, rigardu foje sur la skalon de via radio-aparato!

Se temas pri mezaj ondoj, alĝustigi la ricevilon je dezirata frekvenco ĝenerale ne kaŭzas malfacilaĵojn; ĉe mallongaj ondoj ne estas tiom facile. Pro tio riceviloj kun ciferkoda frekvenc-indikilo estas granda helpo. Se vi ne havas, vi povas plifaciligi la retrovodon de unuopaj frekvencoj per markoj sur la skalo de via radio-aparato.

Radio AŬSTRIO Internacia: A-1136 Wien, Aŭstrio. Ĉiudamanĉe okazas du programoj, direktataj al aŭskultantoj ĉefe en Eŭropo kaj Azio.

Radio BANDEIRANTES: San-Paŭlo, Brazilo. Ĉiutage elsendas la programon de la Sistemo "Religio de Dio".

Radio HAVANO: Pf. 6240, La Habana, Kubo (telekso 51 1344 rĉ cu). Elsendas ĉiudamanĉe trifoje al Ameriko kaj dufoje al Mediteraneo kaj Eŭropo. En Eŭropo ĝi kutime kapteblas nur malforte, sed kelkfoje relative bone.

LITOVA Radio, Vilno: Radiocentras, A.D. 1792, LT-2019 Vilnius, Litovio. Elsendas la lastan sabaton de ĉiu monato.

Radio PEKINO: 2 Fuxingmenwai Avenue, Beijing 100866, Popola Resp. Ĉinio. Elsendas ĉiutage 4-foje al diversaj mond-regionoj; la elsendo por Eŭropo okazas ekde la 20-a horo laŭ UTC. Aŭskultantoj povas partopreni ĝis septembro konkurson pri ĉina historio.

POLA Radio, Varsovio: Skrytka pocztowa 46, PL-00950 Warszawa, Pollando (tel. +48-22-459-358, +48-22-459-337; fakso +48-22-444-123). Disaŭdigas ĉiutage 2 programojn, ĉefe por eŭropaj aŭskultantoj.

Radiotelevisione Italiana (RAI): Casella Postale 320, I-00100 Roma, Italio. Ĉiŝabate okazas 20-minuta programo por Eŭropo.

SVISA Radio Internacia (SRI), Berno: Giacomettistrasse 1, CH-3000 Bern 15, Svislando. Pro financaj kialoj, Svisa Radio ĉesis elsendi en Esperanto fine de marto 1992. Anstataŭe oni disponigas la E-programojn al aliaj radio-stacioj, kaj enkondukos per-kasedan servon (alsendo de sonkasedoj kontraŭ eta kotizo por kovri la kostojn). Se tiu nova servo interesas vin, nepre skribu al la stacio.

Radio TALLINN: 200100 Tallinn, Estonio. Ĉiŝemajne okazas du programoj, kiuj aŭdeblas ĉefe en Norda Eŭropo.

Radio Vatikano: I-00120 Città del Vaticano. Elsendas dufoje ŝemajne por aŭskultantoj en Eŭropo kaj en la Proksima Oriento.

Se vi interesigas pri aliĝo al **fakasocio pri lingva reformo**, skribu al Novo, Bajonetstraat 78, NL-3014 ZL Rotterdam, Nederlando.

Helpon al viktimoj de Ĉernobil organizas E-rondeto "Verda Stelo", ul. Voronejska 38, SPTU-19, Shostka, Sumŝka obl., Ukrainio. Medikamentoj, vitaminoj, infanaj vestoj kaj piedvestoj estas bonvenaj.

Eblas ricevi plurcent diverslandajn bildkartojn! Aliĝu kun 2 irk-oj aŭ 2 USD. dolare! SORTIMENTO – H-6100 Kis-kunfélyháza, Pf. 138, Hungario.

Nova adreso de Leif Nordenstorm: Björknäsavägen 3 C, 2 tr. S-96134 Boden, Svedio. Tel. 0921-12354.

Cleno Fantin petas urĝe sendi dokumentojn kaj bondezir-kartojn por ekspozicio "Ĉu Esperanto havas estontecon?" Interŝange sendigos memormedalo el Prata. Antaŭdankas Scuola Media G. Ungaretti, I-33080 Prata di Pordenone, Pordenone, Italio.

Dezirata kontakti tutmonde kun bildkartkolektantoj (temo: kristanaj preĝejoj): Saija Talvala, Irt. Linjapuisto 11A5, SF-45700 Kuusankoski, Finnlando.

**Tarifo:** Ĉiu vorto de la anoncetoj kostas 1,40 guldenojn (unu internacian respondukuponon). Pri ilia enhavo ne respondecas la redakcio. Ni donas nenian rabaton por la ripeto de anoncetoj. Por la tarifo de anoncoj, bonvolu vidi la kolofonon.

## Anoncetoj

Pekinaj junaj licenciuoj de angla lingvo kaj literaturo, f-inoj MA Yonglin (nuna studentino de juro – dua licencio) kaj LI Chunfeng (tradukistino) deziras korespondi tutmonde pri vojaĝo, sporto, muziko, literaturo, amikeco k.a.; inter. bk., pk. Sama adreso: P.O.Box 1089, Beijing, CN-100034, Ĉinio.

Karaj neologismemuloj, aĉetu ĉe UEA Ĉiutagaj vortoj kun difinoj (6.60 gld) kaj Mankantaj neologismoj kun difinoj (3.60 gld), kaj vi ricevos foliojn de Forĝistaj neologismoj kun difinoj kun prefaco, kaj vi mem vidos ĉu metra kalendaro estas pli bona ol gregoria, kio estas internacieco, kio estas fina venko.

49-jara direktoro de eldonoj deziras interŝangi filatelajn poŝmarkojn. S. Jansanĝav, P.O.21/797, Ulanbatro, Mongolio.

Esperanto-klubo de Lahti prezentos sin kaj Esperanton en la t.n. "Mola Vendredo"-festo 21-22.8.1992 en Lahti. Bv. skribi poŝtkarton por tiu okazaĵo. Adreso: PK 79, SF-15101 Lahti, Finnlando.

Esperanto, turismo kaj aera sporto. Vi ŝatas teriritadon. Vi ankoraŭ plezure dezirus liberflugadi per moderna paraŝebilo. Spertuloj aŭ komencantoj, venu kun ni malkovri la plej belajn flugadlokojn en Francio. Neoforgesotaj impresoj certigitaj! Familia esperanta etoso dum nekutimaj aŭgustaj ferioj. Pliaj informoj: Esperanto 42, S-ro Stachowicz L., rue Didier Guetton, F-42330 St-Galmier, Francio.

Volas kontakti montgrimantajn e-istojn alpisto Robert Szumielski, PL-30-658 Kraków, ul. Lużycka 53/167, Pollando.

Korespondus tutmonde Olga Borzova (28 j.), maŝinistino de fotoelektaj maŝinoj: ul. gen. Glogoleva, d.30 k.1. kv.29. 123585 Moskvo, Rusio.

Komencanto estas nova gazeto kun legajoj speciale por korespond-kursanoj kaj komencantaj e-istoj: P.O.B. 132, Ekaterinburg, 620041, Rusio.

UEA reeldonas la bazan gvidilon por instruantoj de la internacia lingvo:

### metodiko de la esperanto-instruado

de Rudolf Rakuša (1893-1970)  
Temas pri 3-a eldono de la verko unue aperinta en 1957 kaj kompletigita en 1970. 189p.  
20cm. ISBN 92 9017 045 X.  
Prezo: 15,00 gld Triona rabato ekde tri ekzempleroj.  
Havebla de la Libroŝerbo de UEA.



Hungara lernejo dungus

## DU PEDAGOGOJN

ekde aŭgusto 1992 por intense instrui Esperanton al 6-jaraj infanoj. Fondajo Talento, Pf. 102, H-2041 Budaörs, Hungario. Tel. +36 (1) 189 69 92 aŭ 173 34 54; fakso 140 60 97.

Esperanta tekstprilaborilo por IBM-kongruaj komputiloj

Nur: US\$ 99

Kun PC Universalis via PC-komputilo montras Esperantan tekston sur via ekrano kaj printas ĝin per via punkta aŭ lasera printilo, kune kun la angla, franca, germana, portugala, hispana, nederlanda, sveda, itala kaj aliaj lingvoj! Plene funkciigata de menuoj kaj "muso", komplete provizita de kapabloj, facile uzebla, aŭtomata transiro de vortoj al sekvaj linioj, margen-ĝustigado, paĝ-kapoj kaj piedoj, serĉado/anstataŭigado, aŭtomata kreado de individuigitaj ŝablonletero, kaj multaj aliaj potencaj ecoj. Nur US\$ 99 (aldonu \$5 por afranko). Indiku grandecon de disketoj: 3 1/2- or 5 1/4-colaj. Pago per VISA, AMEX aŭ ĉeko.

Mendu poŝte aŭ telefakse de:  
**COMPUTRONIC CORPORATION**  
P.O. Box 102 Sayvon, Israelo  
Fakso: (972) 3 343270

# LAGAZETO



mondkultura  
sendependa  
esperantisma

PETU PROVNUMERON ĈE:  
LA GAZETO  
55210 CREUE, FRANCIO

**KCE** KULTURA  
CENTRO  
ESPERANTISTA

La Chau-de-Fonds  
SVISLANDO



Grava partio de Esperantujo  
Venau-esperantiĝi • progresi • esperantumi • kongresi  
Petu nian riĉan programon!  
KCE, pf. 779, CH-2300 La Chau-de-Fonds

"Juna estas tiu, kiu sentas sin tia..."



## INTERNACIA JUNULARA SEMAJNO

03-09. de aŭgusto  
u. Esztergom, Hungario  
(tuj post la UK...)

Aliĝilon petu de: LINGVO-Studio, H-1675 Budapest, pk. 87, Hungario



Ĉu vi ŝatas rustikan medion? Malkovru la vilaĝon IGGELBACH, la koron de la naturparko "Pfelcer vald" (Palatinata Arbaro), en idilia germana valo! Meze de pinarboj, la gastejo "Haus Mühleck" (Esperante: "Domo Muela Angulo") malfermas sin por Esperantujo. Ekskursu, konferencu kaj feriu ĉe Waldspeisegaststätte "Haus Mühleck", IGGELBACH, Am Mühleck, K 17, D-W-6738 Elmstein 2 (germanlingvaj informoj). Informoj en Esperanto ĉe Esperanto-Centro Humanismo, IGGELBACH, Schlossgasse 30, D-W-6738 Elmstein 2.

## Foje, pli utila ol pasporto

LA LISTO DE  
GASTIGANTOJ DE  
TEJO

1992

PASPORTA SERVO



Ĉirkaŭ 900 gastigantoj  
en 61 landoj

Mendu ĉe UEA: 18,00 gld. (sesona rabato)

Inter pli ol 3300 titoloj ĉe la Libroservo de UEA, ne troveblas pli valora libro kontraŭ pli bagatela prezo!

## Doña Bárbara

fama romano de famaj aŭtoro kaj tradukinto

"La traduko estas rara juvelo, de kiu ekzistas en nia literaturo tre malmulte da ekzemploj." (Waringhien)

"La tradukinto atingis la plej altan rangon de nia traduka prozo." (Régulo Pérez)

"La traduko impresas mirinde klare kaj posedas la netan rigoron de la kabea stilo en 'La faraojn.'" (Vatré)

**Doña Bárbara** (1929). Rómulo Gallegos (1884-1969). El la hispana trad. F. de Diego Karakaso: Venezuela Esperanto-Asocio, 1975. 264p. 21cm. ISBN 84 399 2885 8. Prezo: 16,20 gld. Triona rabato ekde 3 ekzempleroj!

## Language Problems & Language Planning

Journal of the Center for Research and  
Documentation of World Language Problems

La problemoj. La solvoj.  
La rolo de planado  
en la homa komunikado.  
Kaj la kontribuo de Esperanto.

Redaktas: Probal Daŝgupto,  
Klaus Schubert, Humphrey Tonkin  
Eldonas: John Benjamins, P.O. Box 52519,  
Amsteldijk 44, NL-1007 HA Amsterdam.

Individua abono: 60,00 gld.  
Institucia abono: 125,00 gld.

Abonu pere de la Libroservo de UEA.